

junAmiko

35a jaro, n-ro 1/2008 (121)

APRILIO 2008

INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE ILEI POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ



Lena konstruas novan Tokian turon (LIK, 2007)

Sen lim' ĝis...


La stiloj kaj temoj estas diversaj (afrika popol-muziko, roko, baladoj, itala muziko, aso, ktp.) pri infanoj (la alfabeto, krudeco al infanoj) pri akvo-poluicio, profit-farado kaj media rubo...

Ĉiuj tekstoj kaj muzikaĵoj estas verkitaj de Patrik Delabi kaj Fransuaz' Rochette. Ĉar tio estas "KD ekstra", vi trovos ene, legeblajn per komputilo: bild-rakonton, fotaron, karaokeajn versiojn de du kanzonoj. Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi:



<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd91&lng=e>

Kaj ne forgesu la paĝon de Vinilkosmo: www.myspace.com/vinilkosmo



Invito por vojaĝo

Por sia 26a albumo Jaques Yvart elektis Esperanton. Tio ne estas lia unua provo en la internacia lingvo. Helpe de rimarkinda elekto de kanzonoj Jakvo evoluigas unu el siaj preferataj temoj: vojaĝadon. Oni trovas kanzonojn de Leonard Cohen, Johnny Cash, Georges Moustaki, Georges Brassens kaj liajn proprajn komponaĵojn. Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi:

<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd90&lng=e>

UEA jubileas

Ekzistas kelkaj tut-mondaj esperantistaj organizaĵoj, el kiuj la plej malnova kaj plej grava estas *Universala Esperanto-Asocio (UEA)*, fondita en la jaro 1908.

Ĝiaj celoj estas:

- *disvastigi la uzadon de Esperanto;*
- *plifaciligi ĉia-specajn rilatojn inter la homoj, sen diferencigo laŭ nacieco, religio, politiko aŭ lingvoj;*
- *kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi komprenemon kaj respekton al fremdaj popoloj;*
- *zorgi pri la kunagado de esperantistaj organizaĵoj;*
- *krei internaciajn servojn uzeblajn de ĉiuj homoj;*
- *okazigi la unuversalajn Esperanto-kongresojn (UK) kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn;*

UEA estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio kaj politiko.

La Asocio havas la jenajn kategoriojn de membroj:

- *asociaj membroj are aligitaj de landaj aŭ fakaj asocioj;*
- *individuaj membroj individue enlistigitaj de UEA;*
- *honoraj membroj kaj prezidantoj.*

En ĉiu lando UEA havas ĉefdelegiton aŭ peranton, en opaj lokoj ekzistas delegitoj (D) kaj fakdelegitoj (FD). UEA ĉiu-jare eldonas jarlibron, en kiu interalie troviĝas la listo de ĉiu-specaj delegitoj el la tuta mondo, kaj al kiuj la membroj povas sin turni, se ili vizitas la koncernan lokon aŭ bezonas helpon.

UEA eldonas sian monatan organon „*Esperanto*” kaj ĉiujare organizas universalan kongreson. En 2007 la 92a UK okazis en *Jokohamo* (Japanio) kaj la ĉi-jara, la 93a okazos en *Roterdamo* (Nederlando), kie troviĝas la Centra Oficejo de UEA. Venontjare – omaĝe al la 150-jara dat-reveno de la naskiĝo de Zamenhof – la 94a UK okazos en *Bjalistoko* (Pollando), la naskiĝ-urbo de Zamenhof.

TEJO, la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo havas firman kontakton kun UEA kaj ankaŭ ĝi okazigas apartan kongreson, ĉi-jare en Hungario (vidu la paĝon 7).

ENHAVO

Foto de IIK-ano (<i>B. Schumann</i>)	1	LUDE	
Novaj KD-oj de Vinilkosmo	2	En la ripozejo (<i>M. Molnár</i>)	24
UEA jubileas	3	EmilErni inter zbrugoj (<i>smg</i>).....	26
Enhavo. Kolofono.....	4	KVINO-KVIZO: Trovita urso	
Al nia lingvo (<i>Julio Baghy</i>)	5	(<i>Sonja kaj Stefan MacGill</i>)	29
Hura por UEA (<i>A. Karkiainen</i>)	6	Interkultura mondo	
Venu por interkonatiĝi	8	(<i>EoLa – Elena Nadikova</i>).....	33
Rano kaj korvo (<i>M. Jadranka</i>)	10	El nia literaturo (<i>B. Ragnarsson</i>) ..	36
Fabelkonkurso en Esp.	11	Verda paĝo, Jaro de la lingvoj	38
Kvizoludo, cifera enigmo	12	Esperanto kaj mi (<i>N. T.N. Lan</i>)	39
Renkontejo de Eŭropaj infanoj	14	Mirindaĵoj de la mondo (<i>D. Berndt</i>)	40
Kato kaj fungo	14	Ĉenraporto de <i>Liette Lea</i>	42
Humuro	16	Ludu! (<i>Geza Kurucz</i>)	43
Frandaj esprimoj kun „buŝo”	17	Frandaj esprimoj kun „hundo”	43
LUME: Oni Perdis Ion (<i>smg</i>)	18	El nia historio (<i>Árpád Rátkai</i>)	44
Kolorigu kokinon kaj kokidojn ...	20	Ĝardenumado (<i>Judit Felszeghy</i>)..	46
Kokin-fiero (poemo de <i>smg</i>)	21	Lingva doktoro (<i>G. Kurucz</i>)	49
Konsiloj por OPI (<i>smg</i>)	22	Testo (<i>G. Kurucz</i>)	50
Respondoj al enigmoj kaj		Kolibrido (<i>J.J.C. Pacheco</i>)	51
vortklarigoj	23	Esperanto – ŝlosilo	52

Sen pied-notoj JUNA AMIKO uzas la plej oftajn 1500 vort-radikojn, kiujn vi trovas en nia hejma-paĝo: www.junaamiko.inf.hu aŭ en www.eo.lernu.net.

Eldonanto de JUNA AMIKO: ILEI, Riouwstr.172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
Redaktoroj: *Stefan MacGill* (Pannónia u.30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario, stefan.macgill@gmail.com) kaj *Géza Kurucz* (Hitel u.10.fsz.16, HU-6000 Kecskemét, Hungario, geza@banyai-kkt.sulinet.hu)
Lingva revizianto: *Baldur Ragnarsson* (Islando).
Kunlaborantoj: *s-ino Saliko, Anja Karkiainen, Vesa Pölkki* (Finnlando), *Elena Nadikova* (Rusio), *Neringa Zasaite* (Litovio), *Marie-Helene Desert* (Francio), *Jadranka Mirić* (Serbio), *s-ino Saranath* (Hindio), *Bardhyl Selimi* (Albanio), *Dieter Berndt* (Germanio), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Elizabeta Rajtmár, Zoltán Kurucz, Monika Molnár, Judit Felszeghy, Hajnal kaj Karina MacGill* (Hungario), *Marija Belošević* (Kroatio), *Michel Nkwirikiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *José J. Campos Pacheco* (Kubo), *Jasuo Hori* (Japanio), *Gian Piero Savio* (Israelo), *Nguyen Thi Ngoc Lan* (Vjetnamio).
Grafikistoj: *Pavel Rak* (Ĉeĥio), *Monika Molnár* (Hungario).
Komputila kolora tekniko: *János Bakk* (Hungario). Presita kunlabore kun la **Presejo Saluton**, Budapeŝto, Hungario.
Administranto: *Stefan MacGill* (adreso supre) kaj *Anna Besenyei* (Hungario), retadreso: esperanna@gmail.com

ISSN 0230 1318

La sekva numero aperos en septembro.

Mi rekomendas al niaj junaj amikoj parkerigi la apudan poemon pro du kialoj. La unua: ĝi estas lingve facila, forme kaj enhave bela. La dua kialo estas privata (pardonu!). Kiel junulo mi kvar-foje renkontis s-ron Julio Baghy (:Bagi, 1891-1967) kaj ĉiam forte kaptis min lia profunda humaneco, amo al la hom-fratoj, malgraŭ teruraj suferoj en Siberia milit-kaptitejo post la unua mond-milito. Mi admiras lian sinceran profundan esperantismon. Mi petas do vin gardi lian karan memoron, kiu – bedaŭrinde – jam 40 jarojn ne vivas inter ni.

Geza Kurucz

Julio Baghy

AL NIA LINGVO

Vi, bela lingvo Esperanto,
en mi la penso jam ne mutas;
parolas sentoj en la kanto,
per kiu vin mi nun salutas.

Ho, kie estas via lando? –
demandas homoj. La respondo:
La lingvoland' de Esperanto
jam estas nia tuta mondo!

Al tuta mond' vi apartenas,
al alto levas vi la homon,
kaj kiu vin en koro tenas,
de vi ricevas belon, bonon.

En homan mondon venas amo
per nova sento, kor-muziko;
vi faras pacon el malamo
kaj fraton el la malamiko.

Vi donas al mi, Esperanto,
kulturon novan kaj laboron...
Sed kion donu mi, lernanto? –
Akceptu mian tutan koron!

PORINFANA ESPERANTO- RENKONTEJO

Porinfana Esperanto-Renkontejo estas paĝaro, kies enhavo celas infanojn, junulojn kaj familiojn el la tuta mondo. La paĝaro startis la 15an de decembro 2007 kaj atendas la viziton kaj helpon de ĉiuj bonintenculoj. Espereble, ne mankos vizitanoj kaj kontribuantoj, sekve baldaŭ ĝi fariĝos unu el la plej popularaj amuzejoj de niaj legantoj. Vi trovas ilin sub:

www.porinfana.net

La paĝaron prizorgas brazilaj esperantistoj sub la gvido de *sino Eva Satierf* kaj nia kara kunlaboranto *Evandro de Freitas*. La paĝaro havas rektajn ligojn al nia revuo, ILEI, lernu! kaj prezentas jam nun por vizitanoj ludojn, kapo-rompajn taskojn, fabelojn kaj kantojn. Por diskonigi la paĝaron ni baldaŭ prezentos kelkajn ludojn kaj tasketojn. La redakcio kore invitas vin kunlabori. Venu kaj helpu por ke la paĝo fariĝu vera amuzejo por la infanoj kaj utila fonto de niaj pedagogoj.

Anja Karkiainen

HURA POR UEA!

*Pensis pola knabo juna:
"Certe pacon savus
lingvo simpla kaj komuna,
se ni tian havus.
Tuj ĝin ellaboru mi,
kaj la mondo bonos pli!"*

*Baldaŭ montri li koncepton
al amikoj povis,
kaj l' ideo tuj adepton
ie tie trovis.
Ili solaj aŭ en klub'
disvastigis ĝin sen dub'.*

*Kreskis el la kluboj etaj
landaj asocioj.
Kvankam ili estis pretaj
lukti kun defioj,
oni pensis: kontraŭ kriz'
neprus monda organiz'.*

*Jam de longa temp' reala
tiu ligo estas.
Asoci' universala
nun merite festas!
Kriu ĉiuj ni: Hura!
Centjariĝas UEA!*

Hura, hura por UEA!

Muziko: Vesa Pölkki

Pen - sis po - la kna-bo ju-na: „Cer-te pa-con sa - vus
ling - vo simp - la kaj ko - mu - na, se ni ti - an ha - vus.
Tuj ĝin el - la - bo - ru mi, kaj la mon - do bo - nos
pli ! Hu - ră, hu - ră por U E A !

adepto: persono, kiu aliĝis al iu ideo kaj laboras por ties realigado / *asocio*: grava societo, kuniganta la membrojn por komuna celo / *defii*: diri, ke iu(j) ne kapablas venki / *hura!*: krio, esprimo de granda ĝojo / *koncepto*: ĝenerala ideo, plano / *krizo*: grava, danĝera ŝanĝiĝo en (san)stato / *UEA* – *Universala Esperanto-Asocio*; *universala*: ĝenerala, tutmonda pint-organizaĵo.

Bonvenon al IJK 2008

IJK okazos en Szombathely
(*Sombathej*; hungare *szombat* = *sabato*,
hely = *ejo*, sekve: *Szombathely* = *Sabatejo*),
Hungario. Ĝi daŭros de la 26a
de julio ĝis la 2a de aŭgusto. La
kongresa ĉeftemo estos:



Minoritataj rajtoj – individuaj kaj kolektivaj.

Pliajn detalojn serĉu ĉe: <http://esperanto.net/ijk2008>

La hungaraj organizantoj invitas per bela priakcepta verso:

De sabato al sabato sabatumu en Sabatejo !

Venu por interkonatiĝi!

Tiu ĉi paĝo-paro servas geknabojn, kiuj lernas Esperanton kaj aktivis en AKEL, LingvoLanĉilo, InterKulturo aŭ en iu alia formo, ekzemple skoltaj aŭ ĝemel-urbaj kontaktoj aŭ, simple, interesiĝas pri eksterlandaj kulturoj.

Kun malĝojo la redakcio konstatas, ke pluraj antaŭaj respondintoj, nome la hungaroj, kroatoj kaj britoj forgesis sendi siajn respondojn. Ni esperas, ke ilia silento estas provizora, ke ili baldaŭ denove ekparolos kaj igos nian rubrikon pli interesa. Ali-flanke, kun granda ĝojo ni bon-venigas la aliĝon de ĉefaj geamiko-koj *Milada Koralova* kaj *Mlada Boleslav*. Elkoran dankon!

Jen estas la respondoj el tri landoj: **Vjetnamio** (VN, *Nguyen Thanh Van*), **Kubo** (CU, *Jaime Alberto Pérez Honan*, lia frato: *Jorge Arturo Pérez Honan*, *Iselis Arencibia*), **Ĉeĥio** (CZ, *Milda Koralova*, *Mlada Boleslav*). Legante iliajn respondojn, espereble ankaŭ vi tuj ekhavos emon respondi la demandojn. Ne hezitu, ekagu!

1. Kio estas la plej ŝatata manĝaĵo en via regiono/lando?

VN: *La vjetnama gastronomio estas fama. Mi opinias, ke „pho” estas la plej ŝatata manĝaĵo en mia lando, precipe la hanoja „pho”. Ĝi havas sian propran guston, kiun vi nenie povas trovi. Estus granda manko, se – vizitante Hanojon – vi ne gustumus tiun mirindan manĝaĵon.*

CU: *La plej ŝatata manĝaĵo en Kubo estas porkaĵo, sed Jaime preferas kokaĵon kaj rizon kun nigra fazeolo, Jorge – spagetojn kaj picon.*

CZ: *La ĉeĥa nacia manĝaĵo estas porkaĵo kun knedliko kaj acida brasi-ko. Mi konas eĉ ne unu homon, kiu ĝin malŝatas.*

2. Ĉu vi vizitis jam aliajn landojn? Kiujn?

VN: *Ne, mi ankoraŭ ne havis okazon viziti aliajn landojn, sed mi esperas, ke en la estonteco mi povos vojaĝi al Japanio, kiu estas mia plej ŝatata translima lando. La tradicia kulturo de Japanio vere interesas min.*

CU: *Ne, ni ankoraŭ ne vizitis aliajn landojn.*

CZ: *Mi vizitis Rumanion, Svedion, kie mi renkontis tre afablan esperant-istinon. Tio estis mia unua eksterlanda Esperanto-renkontiĝo. Pasintjare mi vojaĝis al Francio por viziti E-amikojn – tre agrabla travivaĵo!*

3. Ĉu vi havas biciklon? Ĉu vi ofte veturas per ĝi?

VN: *Jes, mi havas biciklon. Antaŭe, kiam mi estis gimnaziano, mi ofte veturis per ĝi al la lernejo.*

Vi (individuo aŭ grupo) devas mallonge respondi 5 demandojn kaj sendi ilin al la redaktoro (geza@banyai-kkt.sulinet.hu). Kunsendu 1 demandon.

Kun ĝojo ni akceptas ankaŭ respondojn pri la antaŭaj demandoj. Ili aperas en nia hejma-paĝo (www.junaamiko.inf.hu) sub titolo: Venu por interkonatiĝi! Valoras ĝin viziti!

CU: Ni ne havas biciklon, sed tre ŝatus veturi per ĝi.

CZ: Jes, mi havas biciklon kaj ofte uzas ĝin. Dum „ĝardena” sezono mi biciklas al la ĝardeno (2,5 km de la hejmo). Ĝi estas preskaŭ amiko.

4. Kiu(j)n popolo(j)n oni respektas plej alte en via lando?

VN: La vjetnama popolo plej alte respektas prezidenton Ho Chi Minh, kiun vjetnamoj intime vokas „Onklo Ho”. Li foroferis sian tutan vivon por liberigi la vjetnaman nacion de fremdaj invadoj.

CU: Bolivion kaj Venezuelon, kie laboras la gepatroj de Jaime kaj Jorge kiel kuracistoj.

CZ: Ne estas facile respondi la demandon. Ĉe ni oni pleje respektas francojn. Slovakoj estas kiel fratoj, oni riproĉas kaj respektas ilin. Simile la popolojn de slava deveno.

5. Kiom da horoj vi dormas?

VN: Nokte mi dormas 7 aŭ 8 horojn. Kaj se eblas, mi dormas ĉirkaŭ 30 minutojn tagmeze. Tiu dormeto rebonigas mian sanon kaj menson post diligenta matena laboro.

CU: Ni enlitiĝas je la 11a vespere, ĉar ni longe spektas televidon, kaj ellitiĝas je la 7a matene por ĉeesti en la lernejo. Sabate kaj dimanĉe (tiam oni ne vizitas lernejon) ni vekigas iom pli malfrue.

CZ: Mi dormas kutime 7 horojn.

NOVAJ DEMANDOJ:

1. Kiam vi havas nacian festotagon? Pri kio vi rememoras tiam?

2. Ĉe vi el kiom da lerno-tagetoj konsistas semajno?

3. Kiom da horoj vi pasigas antaŭ televidilo/komputilo?

4. Kion vi trinkas, kiam vi soifas?

5. Kiun frukton oni manĝas plej multe en via lando?

Ne forgesu aldoni demandon, kiu aperos en nia sekva numero.

La respondojn sendu ĝis la **1a de aŭgusto 2008** al

geza@banyai-kkt.sulinet.hu

RANO KAJ KORVO

Foje korvo kaptis dikan rano, prenis ĝin per la beko kaj ekflugis sur la tegmenton de proksima domo por senĝene formanĝi tie la kaptajon. Sed apenaŭ la korvo metis ĝin sur la tegmenton, kiam la rano subridetis feliĉe.

– Kial vi ridas, franĵeto rano? – demandis ŝin la korvo.

– Nenial, fraĵo korvo, estas simpla bagatelaĵo – respondis al li la korvo. – Estas kvazaŭ mendita afero. Sur tiu ĉi tegmento loĝas mia frato, pri kiu vi ne scias, kiom forta kaj kruela li estas. Li certe ne permesos, ke iu ajn ofendu min.

Malplaĉas al la korvo la vortoj pri la kruela frato. Li decidas, do, manĝi ŝin sur ia pli sekura loko. Li reprenas la ranon en la bekon, kaj transflugas la defluilon. Tiam la rano eĉ pli subridas.

– Kial vi denove ridas? – demandas la korvo.

– Mi ne scias, ĉu estas menciinde diri al vi tian sensencaĵon, fraĵo korvo, – respondas la rano –, sed ĝuste en tiu ĉi defluilo loĝas mia onklo, kiu estas pli forta kaj pli kruela ol mia frato.

Ektimas la korvo kaj decidas forfuĝi de la tegmento, kie loĝas kruelaj parencoj de la rano. Li denove prenas ŝin en la bekon, malsupreniĝas kaj surteriĝas apud puto.

– Nu, ĉi tie vi jam certe ne havas parencojn – diras la korvo metinte la ranon sur la grundon.

– Sed ĝuste kiam la korvo estas formanĝonta ŝin, ŝi ekparolas:

– Fi, fraĵo, korvo! Ekrigardu, kiel malakra kaj malpura estas via beko. Estus utile akriĝi kaj purigi ĝin antaŭ ol manĝi. Jen ĉi-apude troviĝas plata ŝtono, kiu estas taŭga por akriĝi ĝin.

– Vere –, ekpensis la korvo –, estas tempo akriĝi la bekon.


Li eksaltetis ĝis la plata ŝtono kaj tuj komencis akriĝi per ĝi la bekon. Sed ĝuste kiam la korvo turnis sian dorson al ŝi, per unu malespera salto ŝi malaperis en la puto.

Akriginte sian bekon, la korvo revenis, sed el la rano eĉ herbaĉo ne restis.

Alsaltetis la korvo ĝis la rando de la puto, turnas la kapon al ĉiu direkto kaj laste ekvidas sube la ranon.

– Franĵeto rano, ĉu vi estas tie? – diris li kun dolĉa voĉo, – Mi ektimis, ke mi perdis vin. Venu ĉi tien, mia beko estas jam pura kaj akra!

– Mi volonte venus al vi, fraĵo korvo, sed mi ne povas eliri. Estus pli bone, se vi venus suben, por formanĝi min ĉi tie –, ekridis la rano kaj subakviĝis al la profundo de la puto.



Tibeta popola rakonto, eldonita en Beogrado, 1979

Tradukis: *Mirić Jadranka, Serbio*

Ĉu vi ŝatas fabelojn?

Ĉu vi aĝas malpli ol 14 jarojn?

Se viaj respondoj estas jesaj, ne preterpasu la okazon!

Partoprenu en la Tut-monda Esperanta Fabel-konkurso!

Kultura-literatuta centro en Taivalkoski, Norda Finnlando, portas la nomon de *Kalle Päätalo* (1919-2000) eminenta finna verkisto naskiĝinta en Taivalkoski. En la jaro 1993 li iniciatis tut-landan fabelkonkurson por finnaj infanoj, kiu estas nuntempe la plej prestiĝa konkurso en Finnlando.

En la jaro 2000 la instituto aldonis al la konkurso Esperanton. En ĉi tiu jaro ĝi okazos, do, jam la okan fojon.

Kategorioj:

A) por infanoj ĝis 8-jaraj,

B) 9-10-jaraj kaj

C) 11-13-jaraj.

Rimarko. La konkursaĵoj devas esti verkitaj originale en Esperanto de individuoj aŭ grupoj (ekz. de lernejoj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksataj aparte.

La ĵurio aprezas precipe fabelecon kaj originalecon. La verko estu mallonga (1-5 folioj), ligita al la infana mondo, karakterizita de sorĉeco, mistero kaj supernaturaj okazaĵoj, kiuj kreas etoson fascinantan al infanoj. Rakonto kun temo el la reala mondo, eĉ se lerte verkita, ne estas konsiderata kiel fabelo.

Sendu la konkursaĵon poŝte **ĝis la 15a de septembro 2008** al la adreso:

**Päätalo-Instituto, Fabelkonkurso,
PL 39, FI-93401 Taivalkoski,
Finnlando**

Uzu kaŝ-nomon kaj menciu, ĉu temas pri grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝ-dato kaj (se eblas) telefonnumero aŭ ret-adreso de la konkursanto troviĝu **en aparta fermita koverto**.

Pli da informoj donas la komisiito pri la konkurso:

S-ino **Aini Vääräniemi**, Vääräjärventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando.

Ŝia retadreso: *aini.esp@pp.inet.fi*

(Fabeloj, premiitaj en antaŭaj jaroj, estas legeblaj en:
<http://www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti/esperanto.htm>)

La rezultojn oni publikigos sam-tempe kun tiuj de la finna konkurso, la **18an de oktobro**, kiam finnoj festas la tagon de Satu (finna vorto por fabelo). En ĉiu kategorio estas principe tri premioj. Unu el la gajnintoj de la unua premio ricevos ankaŭ la ĉef-premion **Fabelo Internacia**.

fascini: fortege kapti ies animon / *originala:* ne tradukita / *prestiĝa:* elstara kaj fama, vaste konata.

CIFERA ENIGMO

			5		3		7	
		4		7	2			
	7						8	5
9					1		5	2
	5					3		
4	3		9		5			
				5				6
3		9	6					1
		5	1			9	4	

Enskribu la mankantajn unu-ciferajn nombrojn de 1 ĝis 9 en la kvadratoj tiele, ke ĉiu kvadrato enhavu la nombrojn de 1 ĝis 9, kaj la granda kvadrato same, en ĉiu linio kaj kolono enhavu la nombrojn de 1 ĝis 9, t.e. ĉiu nombro nur unu-loke povas troviĝi en ĉiu linio kaj en ĉiu kolono de la kvadrato. Ne ekzistas pluraj variaĵoj, sed nur unu-sola.

Se vi trovis la solvon, sendu ĝin rete aŭ papere al s-ro Dieter BERNDT (vidu p.12), kiu rekompencos vin per plusaj poentoj, kaj la plej bonaj konkursantoj estos premiitaj per libroj aŭ jarabonoj por JA.

Ĉas-putoro

En februaro alvenis al la bestĝardeno de Veszprém [Vesprem] du ĉasputoroj.

La ĉasputoro (*Mustela putorius furo*) estas subspecio de la eŭropa putoro. Ĝi vivas de jar-centoj kiel kunulo de la homo.

Estas diskutate, kiuj, kie, kiel kaj kiam dombestigadis ĝin, sed oni menciis ĝin jam en la antikva epoko. Ĝi estis alte taksata ankaŭ en la mez-epoko, kiam leĝo dekretis, ke nur riĉegaj homoj rajtas ĝin havi.

Oni bredis ĉasputoron pro ĝia valora felo, leporĉasado kaj ekstermado de ronĝuloj. Ekde kelkaj jardekoj ĝi estas pli kaj pli populara kiel ekzota dorlotbesto aŭ dombesteto.

Ĝi apartenas al la ordo de rabo-bestoj kaj al la familio de musteloj.



dekreto: akto kun devigaj reguloj / *dorloti*: am-plene, kareseme rilati al iu / *ekstermi*: tute pereigi, mortigi / *ekzota*: devenanta el tre malproksima fremda lando / *felo*: densa hararo de bestoj / *putoro*: mam-besto, vidu la foton / *ronĝi*: mordi, dispecigi uzante la dentojn / *specio*: subdivido de genro aŭ subgenro.

CIFERA ENIGMO

			5		3		7	
		4		7	2			
	7						8	5
9					1		5	2
	5					3		
4	3		9		5			
				5				6
3		9	6					1
		5	1			9	4	

Enskribu la mankantajn unu-ciferajn nombrojn de 1 ĝis 9 en la kvadratoj tiele, ke ĉiu kvadrato enhavu la nombrojn de 1 ĝis 9, kaj la granda kvadrato same, en ĉiu linio kaj kolono enhavu la nombrojn de 1 ĝis 9, t.e. ĉiu nombro nur unu-loke povas troviĝi en ĉiu linio kaj en ĉiu kolono de la kvadrato. Ne ekzistas pluraj variaĵoj, sed nur unu-sola.

Se vi trovis la solvon, sendu ĝin rete aŭ papere al s-ro Dieter BERNDT (vidu p.12), kiu rekompencos vin per plusaj poentoj, kaj la plej bonaj konkursantoj estos premiitaj per libroj aŭ jarabonoj por JA.

Ĉas-putoro

En februaro alvenis al la bestĝardeno de Veszprém [Vesprem] du ĉasputoroj. La ĉasputoro (*Mustela putorius furo*) estas subspecio de la eŭropa putoro. Ĝi vivas de jar-centoj kiel kunulo de la homo.

Estas diskutate, kiuj, kie, kiel kaj kiam dombestigadis ĝin, sed oni menciis ĝin jam en la antikva epoko. Ĝi estis alte taksata ankaŭ en la mez-epoko, kiam leĝo dekretis, ke nur riĉegaj homoj rajtas ĝin havi.

Oni bredis ĉasputoron pro ĝia valora felo, leporĉasado kaj ekstermado de ronguloj. Ekde kelkaj jardekoj ĝi estas pli kaj pli populara kiel ekzota dorlotbesto aŭ dombesteto.

Ĝi apartenas al la ordo de rabo-bestoj kaj al la familio de musteloj.

dekreto: akto kun devigaj reguloj / *dorloti*: am-plene, kareseme rilati al iu / *ekstermi*: tute pereigi, mortigi / *ekzota*: devenanta el tre malproksima fremda lando / *felo*: densa hararo de bestoj / *putoro*: mam-besto, vidu la foton / *ronĝi*: mordi, dispecigi uzante la dentojn / *specio*: subdivido de genro aŭ subgenro.



RENKONTEJO DE EŬROPAJ INFANOJ

La Asocio Estonteco de Eŭropo ekestis en la jaro 1990 en mezhungaria urbo Kecskemét [Keĉkemét], en tiu sama urbo, kie antaŭ 36 jaroj naskiĝis la ideo de Juna Amiko. Ili ambaŭ elkreskis el la sama radiko: interkonatiĝu por interamikiĝi.

La sukceso de la Asocio estas pli granda kaj videbla. La esenco de ĝia agado: baz-lernejanoj de Kecskemét invitas al si eksterlandajn infanojn, kiuj loĝas ĉe lokaj familioj, dum unu semajno. Interŝanĝe la infanoj kunportas kiel donacon siajn naciajn muzikon, dancan, t.e. programon, kiu konigas la nacian kulturon al ali-landaj infanoj. Post unu jaro la invititoj gastigas siajn Keĉkemetajn amikojn en sia hejmlando. Ĉu ekzistas pli nobla idealo ol eduki al toleremo sen antaŭjuĝoj?

Ĝis nun keĉkemetanoj gastigis pli ol 10 mil infanojn el ĉirkaŭ 100 urboj de Eŭropo, sed venis gastoj ankaŭ el Suda Koreio,

Israelo kaj Usono. Pro sia nobla kaj sindona agado en 2006, la Asocio ricevis en Bruselo la Civilan Medalon de Eŭropo, la plej altan distingon por merit-plenaj agantoj.

La emblemo de la Asocio fariĝis birdido „ĉirpulido“, verko de tiama lernantino *Csilla Szabó*, kiu ankaŭ nuntempe agadas por la Asocio.

La ĉi-jara renkontiĝo estos la 10a, jubilea kunveno. Ĝis nun aliĝis jam pli ol 2000 infanoj el 20 landoj.

Dum la ĉi-jara renkontiĝo aperos ankaŭ Esperanto. HEA (Hungaria Esperanto-Asocio) deĵoros en aparta pavilono kaj disdonos informilojn pri Esperanto. Ni esperas, ke helpe de la landaj Esperanto-Asocioj en la sekva renkontiĝo jam troviĝos pluraj infanoj, kiuj uzos nian neŭtralan lingvon, indan servilon al komuna nobla celado.

Ni bezonas ankaŭ vian helpon.



Ĉirpi: insekte, birdide paroli / *emblemo:* simbolo de ideo, agado por io / *idealo:* alta, nobla celo atinginda / *medalo:* distinga memoraĵo pro ekzemplo-dona agado.

KONTAKTO

Bel-aspekta kaj interesa revuo
de Tut-monda Esperantista Junulara Organizo
TTT-ejo: www.tejo.org/eldonoj.jsp

SURPRIZA AVENTURO

Estis belega tago. Fine, post abundaj aŭtunaj pluvoj la familio Jovanoviĉ povis iri en la arbaron. Alvenis la sezono de fungo-rikoltado. La arbaro pleniĝis per mult-specaj fungoj.

La plej junaj familianoj gaje saltetis, provis sin kaŝi malantaŭ arbustoj aŭ arbetoj. Dume la pli oldaj anoj serioze serĉadis manĝeblajn fungojn. La patro montris kiel aspektas venena fungo. Ili rikoltis la fungojn ek- kaj ek-kriante gaje. Post kelka tempo ili laciĝis. La korbo estis jam plenplena de fungoj. Kontentaj ili vigle interfrotadis la manojn kaj ekkantetis. Dum ilia reveno hejmen la infanoj marŝis antaŭ ili babilante.

Hejme tuj komenciĝis la purigado. La panjo sperte preparis ĉion kaj baldaŭ ĉiu povis sidiĝi ĉirkaŭ la tablo. Kiom bongustaj estis la fungoj! Ili trinkis vinon, bieron kaj frukto-sukon, ĉiam laŭdante la fungojn.

La plej juna infano de la familio, etulo Joĉjo stariĝis apud la pordo kaj rigardis eksteren. Subite li ekkuris al sia favorata kato Milka. Mirigite li rigardis la katon kaj tuj forkuris reen.

„Panjo, paĉjo, venu, venu rapide!” kriaĉis la etulo. „Rigardu, mia Milka mortis.” Per larma voĉo li klinis la kapon al la ŝultro de la panjo. „Mi donis al ĝi iom da fungoj.”

Konsternitaj ili rigardis unu la alian. Iliaj vizaĝoj ŝanĝiĝis jen ruĝaj, jen grizaj.

„Urĝe ni devos viziti kuraciston”, diris la patro provante trovi la ŝlosilon de la aŭtomobilo. Kaj ĉiuj, kvazaŭ frenezaj, eniris la aŭton. Ja ili sentis doloron, naŭzon kaj timegon.

Kaj kio okazis poste? La kuracisto donis al ili injektaĵon, preskribis medikamenton. Ili estis lacaj post tia turmento, sed fariĝis iom trankvilaj.

Reveninte hejmen atendis ilin nova surprizo. Ilia favorata kato sidis trankvile, ĉirkaŭata de siaj idoj. Post longa minuto ili ekridis kaj alpaŝis al Milka por havi pli bonan rigardon al la novnaskitoj.


Verkis *Miriĉ Jadranka,*
Zajeĉar (Serbio)



GRANDA ŜERC-ENCIKLOPEDIO

“Akuzato, kial vi ŝtelis la aŭton?”
“Ĉar mi rapide devis aperi en la laborejo!”
“Kial vi ne iris per buso?”
“Buson mi tamen ne kuraĝis ŝteli.”

“Mi testamentis mian cerbon al hospitalo.”
“Kaj kiel reagis la hospitalo?”
“Ili estas tre dankemaj pro ĉiuj bagatelaĵoj.”



“Diru, kara fraŭlino, ĉu vi havas partneron por la sekva danco?”
“Ankoraŭ ne.”
“Bonvolu do gardi mian bieron ĝis mi revenos.”

JUN-EDZINO

“Karulo, mi devas ion konfesi. Mi scias fari nur pat-kukojn kaj grasitajn panojn.”

“Kaj tio estas kiu el ili?”

Sinjoro Kovaĉ estas maljuna fraŭlo, sed li volas edziĝi.

Li diras al la amiko:

“Mi volas edzinigi virinon, kies ĉiuj ecoj estas kontraŭaj al la miaj.”

“Ne estas malfacile. Ja la mondo estas plena de belaj kaj inteligentaj virinoj.”

PSIKIATRIEJO

Fremdulo eniras en la akceptejon kaj falinte en fotelon li diras:

"Sinjoro doktoro, mi forgesas ĉion. Konsilu: kion fari?"
"Anticipe pagi!"

*

"Fileto kara, la najbaro prunteprenis la magnetofonon por hodiaŭ vespere."

"Maleble, ĉu ili volas danci?"

"Ne. Dormi."




"Mi devas tuj ridegi ekvidante iun stultan mienon."

"Ĉu tio ne ĝenas vin dum sinrazado?"

OPERACIO

Post grava operacio vekiĝadas la malsanulo. Konata vizaĝo kliniĝas super lin.
"Kara sinjoro doktoro, kiel sukcesis la operacio?"
"La operacio ne sukcesis aparte brile, kaj mi ne estas via kuracisto, sed Sankta Petro."



"Sankta Ĉielo! Kio okazis al via mano?"

"Mordis ĝin hundo."

"Ĉu vi desinfektis ĝin?"

"Ne, ĝi forkuris."

Kio estas la pinto de puremo?
Lavi al si la manojn uzante gantojn,
por ke la sapo ne malpuriĝu!

SOLVOJ de Testo (paĝo 50)

1 - A / 2 - C / 3 - C / 4 - B / 5 - B / 6 -
A / 7 - C / 8 - B / 9 - B / 10 - A / 11 - C
/ 12 - B


akuzi: aserti iun kulpa / anticipi: unue, antaŭe / bagatela: tute ne grava aŭ valora / enciklopedio: verko pri la tuto de homaj scioj, vortare aranĝita / inteligenta: saĝa, vigle pensanta / operacii: kurace tranĉi / partnero: kunulo en danco ekzemple / pato: malalta frit-vazo / psikiatrio: kuracado de psikaj malsanoj / stulta: malsaĝa / testamenti: eldiri lastan volon pri sia(j) propra(j)o(j).



ONI PERDIS ION

Kion vi perdas? Kraĵonojn, gantojn, poŝmonon, naztukon? Jen bestoj aŭ personoj, kiuj perdis ion. Helpu al ili trovi, kion ili perdis. Diru al ili, kie ĝi estas. Ekzemple: "Avo, viaj okul-vitroj estas sub la ŝafo." Li respondos:

"Ve! Diru al ĝi, ke ĝi ne sidiĝu, ĝis mi iros tien kaj reprenos ilin!". Kolorigu la objektojn, por ke la posedanto ricevu surprizon, kiam ili finfine trovos ilin. Ni proponas kelkajn kolorojn.



Ho, mia ido ĉiam forkuras. Kie ĝi estas? Helpu min! Krome, iu tondis mian lanon kaj kolorigis ĝin purpura. Mi volas rehavi ĝin. Kie ĝi estas?

La lano de la ŝafo estu helbruna.




La robo estu roz-ruĝa.

K N A B I N O

□ □ □ □ □ □ □ □


Ŝ A F O

□ □ □ □



La framo estu bruna.

Mi malsatas post miaj paskaj taskoj. Kie estas mia karoto?




K U N I K L O

□ □ □ □ □ □ □ □

O K U L V I T R O J

□ □ □ □ □ □ □ □ □ □



Rapidu! Kolorigu la ovon per paskaj koloroj! Uzu ĉiun eblan koloron!


O V O

□ □ □

GRANDA ŜERC-ENCIKLOPEDIO

“Akuzato, kial vi ŝtelis la aŭton?”
“Ĉar mi rapide devis aperi en la laborejo!”
“Kial vi ne iris per buso?”
“Buson mi tamen ne kuraĝis ŝteli.”

“Mi testamentis mian cerbon al hospitalo.”
“Kaj kiel reagis la hospitalo?”
“Ili estas tre dankemaj pro ĉiuj bagatelaĵoj.”



“Diru, kara fraŭlino, ĉu vi havas partneron por la sekva danco?”
“Ankoraŭ ne.”
“Bonvolu do gardi mian bieron ĝis mi revenos.”

JUN-EDZINO

“Karulo, mi devas ion konfesi. Mi scias fari nur pat-kukojn kaj grasitajn panojn.”

“Kaj tio estas kiu el ili?”

Sinjoro Kovaĉ estas maljuna fraŭlo, sed li volas edziĝi.

Li diras al la amiko:

“Mi volas edzinigi virinon, kies ĉiuj ecoj estas kontraŭaj al la miaj.”


“Ne estas malfacile. Ja la mondo estas plena de belaj kaj inteligentaj virinoj.”

K
O
L
O
R
I
G
U

K
O
K
I
N
O
N

kaj

K
O
K
I
D
O
J
N



La glano estu bruna; la folioj verdaj.

G L A N O

□	□	□	□	□
---	---	---	---	---

Jen surprizo!
Du tre perditaj
objektoj el la
antaŭa paĝo.



La lano estu purpura.



L A N O



Du bestoj serĉas ĉi tion! Kiuj? Kiu unue trovos ĝin?

KOKIN-FIERO KOKIN-FERIO

Jen poemo por laŭtlegi al etulo.

Idoj kaj kokino por la pasko.

Kolorigo – jen la tasko.

Sekvu gvidon laŭ la versoj,

Se vi pentros – sen renversoj!

Sunon supre, kolorigu flave.

Herbo estu verda – prave.

Ĉielo estu blua, bela,

griza por la nuboj – hela!

Oranĝaj estu fruktoj fonaj,

buntaj estu floroj bonaj.

Vazo estu plur-kolora,

Rondoj ruĝaj, kun kol' ora.

Flavaj estu idoj junaj,

panjaj plumoj bluaj, brunaj.









Ruĝa estu ŝia kresto,

jen ili – pretaj por la festo.

SMG

MIKSITAJ KOLOROJ

Estas amuze miksi kolorojn dum farbado. Sed sube estas la koloro-nomoj kiuj estas miksitaj. Malmiksu kaj reskribu ilin, kaj kolorigu la cirklojn.



Konsiloj kiel LUMIGI per LUME: Oni perdas ion

Gepatroj, geavoj, geonkloj, instruistoj, aliaj! Uzu ĉi tiun materialon por aktivigi infanojn ĉirkaŭ ok-jaraĝaj en Esperanto. Per tio vi povos entuziasmigi ilin pli memfide paroli en Esperanto kaj eĉ skribi ĝin kaj per tio havi pli pozitivan sintenon al la lingvo.

1. Nomado: Invitu al la infano nomi la montritajn bildojn, ĉu en Esperanto ĉu nacilingve. Se nacilingve, vi nomu tiujn bildojn en Esperanto, instigu ilin ripeti la vortojn, kaj se la infano komencas kapabli legi kaj skribi, montru la majusklo-literan nomon de la objekto, besto aŭ persono.

2. Kalkulado: Infanoj de tiu aĝo tre ŝatas kalkuli kaj kategoriigi objektojn. Invitu ilin kalkuli ĉiujn prezentitaĵojn. Ili klasu ilin – kiom da homoj, kiom da bestoj kaj kiom da objektoj? Kiom da serĉantoj, kiom da perditaĵoj? Por vere lertaj infanoj, plenigu tabelon per ciferoj, tio donos al ili valoran sed simplan ekzemplon, kiel bone resumi kaj kompreni situacion per strukturita aliro:

	Homoj	Bestoj	Objektoj	Sume
Serĉantoj				
Perditaĵoj				
Sume		*		*

* Ĉu vi rimarkas ion strangan? Unu besto estas samtempe perditaĵo kaj serĉanto! Kiu? Krome, unu besto serĉas du aferojn. Kiu?

3. Parigo: Klarigu, ke la personoj aŭ bestoj perdis ion. La tasko estas trovi por ili la perditajn aferojn. Vi aŭ la infano legu la parol-bobelon, por scii kiu perdis kion. Invitu la infanon al ludo montri la perditaĵon por ĉiu perdinto.

4. Skribado: Infanoj de tiu aĝo eklernas legi kaj skribi. Do, ni prezentas la nomojn de la aĵoj per grandaj majusklaĵ literoj. La infano skribu tiujn literojn en la subaj kvadratoj. Vi (aŭ la infano) legu la rezulton. Revenu al la tasko post kelkaj minutoj por konstati kiomgrade la legado okazas pro memoro aŭ pro literforma analizo. Estas relative sendanĝere kuraĝigi al infano legi kaj skribi en Esperanto, kiu ja estas ege fonetika lingvo. Tio devus havi minimuman influon sur la lego-kaj skribo-kapablon en la nacia lingvo, kaj male eĉ povas helpi ilin. Sed ja simple klarigu fonetikajn diferencojn inter Esperanto kaj via nacia lingvo.

5. Koloroj: Infanoj de tiu aĝo ege ŝatas kolorigi bildojn. Kuraĝigu ilin scii la bazajn kolor-nomojn en Esperanto. Vi (aŭ la infano) legu la konsilo-tekstojn por kolorigo kaj elektu konvenan krajonon aŭ alian kolorigilon. Dum la kolorigo, ripetu kaj ripetigu plurfoje la kolor-nomon en Esperanto, por ke la vorto ligiĝu kun la agado kaj la vidata koloro. La kolor-ekzerco dekstre sur la antaŭa paĝo donas ekstran skriban taskon, ne nur kopii la literformojn sed ordigi ilin por formi vortojn.

6. Plio: Serĉu en postaj paĝoj kelkajn sekvojn de la serĉado kaj trovado!


VORTKLARIGOJ por EmilErni sur paĝoj 26-28

fora: malproksima
futuro: estonteco
rampi: iri sur manoj kaj genuoj
vori: manĝegi per grandaj buŝplanoj
vegetara: sen-vianda
bunĝiba salato: prefere ne demandu
frostigita: forte malvarmigita
malfrostigi: varmigi
frostiĝi: ekesti tre malvarma.
rostiĝi: ekesti tre varma
forno: varmigilo – kutime en kuirejo
Trabanto: orient-germana aŭteto.
seĝ-rimeno: sekureca ilo en aŭto.
talio: meza parto de la korpo.
glaĉo: prefere ne demandu
vori unuglute: manĝegegi kun minimuma atento pri etiketo kaj ĝentileco
premi: puŝi
akcelilo: pedalo en aŭto kiun oni puŝas (premas) por iri pli rapide.
ve-ego: Krio de timo, pli forto ol nura 'veo'.

Mi trovis la lanon! Nun mi ludos per ĝi, kaj min kreas el ĝi spageton!



Ĉu mi demetis tian mirindan mult-koloran ovon? Klare, mi estas unika kokino!



Kolorigu ankaŭ la ovon sur ĉi tiu paĝo per ĉiuj koloroj de la ĉiel-arko – vidu kiom la kokino surpriziĝis.

Kion ŝi faros?

BEEE!



Respondoj al enigmoj el la antaŭa numero

Respondoj estas detale legeblaj en la biblioteko de www.lernu.net en la sekcio pri Gazetoj/Juna amiko.

Paĝo 24: Kaŝfrazo al la krucenigmo: Por Emil kaj Erni... NUR LAV-MAŜINA TEMP-VETURILO KONVENAS KAJ KUNVENAS.

Paĝo 29: La sekreta respondo pri Emilo kaj Erni: La lav-maŝino estas revolucia transportilo. La pruvo estas la vertiĝo (kap-turniĝo) de la vojaĝintoj, ĉar ĝi rondiris rapide dum la tempo-vojaĝado.

Paĝo 30: La Kvinokvizo

Tasko 1 – Difinoj: 1E, 2Ĝ, 3G, 4A, 5H, 6F, 7B, 8Ĉ, 9D, 10C.

Tasko 2 – Ordigo: 9, 5, 7, 10, 3, 8, 1, 6, 2, 4.


Tasko 3 – Verb-elekto: forrulis, atingis, malĝoje, memoras, re-enŝaltas, semajno, vetu, inteligenta, saltos, saĝe.

Tasko 4 – Vera, Malvera, Nesciebla: V M V N M V M M V N.

Tasko 5 – Unu el kvar: B C A B Ĉ C C B C Ĉ.

LUDE

LA UNIKA DUA ETAĜO



En la ripozejo



Kiel ĉiuj infanoj bone scias tion, la plej bela kaj interesa okupiĝo estas la ludo. La plenkreskuloj foje havas strangajn ideojn dirante, ke „Ne eblas, ke vi ĉiam ludu!” „Haltu jam ludi!” „Ĉu vi ne scias, ke oni povas fari ankaŭ ion alian ol ludi?” „Ĉesu ludi kaj laboru jam iomete!” ... jes, ili diras tion kaj similaĵojn. Certe ĉiuj konas kelkajn tiajn frazojn. Ĉu ili pravas? Kion vi pensas?

La respondo certe ne facilas, sed tio certas, ke la ludo estas ja laboro por la infanoj. Jen kial niaj infanoj deziris iri en la ripozejon. Ili estis tiom lacaj post la multaj ludoj, ke ili deziris ripozi iomete. Kial estas tiom alloga ilia ripozejo?

Imagu malgrandan ĉambron, kie estas multaj, belaj, koloraj kusenoj surplanke ĉe la muro. Kelkaj estas grandaj, kelkaj grandegaj, sed vi povas trovi ankaŭ etajn, mezajn kaj grandetajn. Sur la muroj estas multaj bretoj je diversaj altecoj, kaj sur la bretoj estas libroj. Libroj pri bestoj, pri princoj kaj princinoj, pri la naturo, pri historietoj aŭ historiegoj. Kelkaj libroj estas malgrandetaj, kelkaj grandetaj kaj ekzistas eĉ gigantaj. Vi povas trovi tie ankaŭ multajn bildrakontojn kun buntaj desegnaĵoj. Jen kien retiriĝis niaj amikoj: Kontentulido, Gajnemulido, Legemulido, Ludemulido kaj

la aliaj. Ĉu vi povas imagi ilian ŝatatan ripozejon? Sendu al ni desegnaĵon, sur kiu vi montras al ni, kiel vi imagas ĝin. Ek, al desegnado!

Solvaj por la antaŭa numero (120)

Digitala matematiko

Aldonante la bastoneton: $69 + 6 = 74$ (68 + 6)

Forprenante la bastoneton: $69 + 6 = 74$ (69 + 5)

Ludu kun ni! (kaj per la ĵetonoj) Solvo: 7-13-27



1	4	●	10	●	16	19	22	●	28	31	34
●	5	8	11	14	17	●	23	26	29	●	35
3	6	9	●	15	18	21	24	●	30	33	36

Kakuro

	14	34		34	14
17	8	9	24	16	7
35	6	7	9	8	5
	19	8	7	4	17
34	7	4	8	6	9
15	9	6	17	9	8

Espereble ke vi bone solvis la enigmojn, ni diras al vi: ĝis la plej baldaŭa revido! Ĝiiiiis!!!!!! ☺

Emil kaj Erni kaptiĝis en fora futuro sur la planedo Kvang. Cele al eskapo, ili kaŝe eniras restoracion, kie dukapa zbrugo manĝas vidbendan tempo-maŝinon. Tia maŝino permesos revenon, sed ĝi estu pli granda!

EMIL ERNI

La gusto ne estas tute sama, sen la filmo ene.

KUIREJO

COMP! COMP!

Rapidu, ni kaŝu nin sub ĉi tiun tablon.

Eble mi tro timis la zbrugojn. Ili havas tre malaltajn tablojn!

Emil kaj Erni silente paŝas en la kuirejon. La zbrugoj ne rimarkas.

Redonu al mi almenaŭ la filmopecojn kiujn vi jam rigardis!

COMP! COMP!

Sed mi ankoraŭ rigardas ilin! Figlaĉa Parko III estas ege bona.

Prave. Kiel povas aspekti bunĝiba salato?

Preferu ne demandu!

En la kuirejo ili jam pretigas la vegetarajn pladojn.

Rapidu kun tiuj bunĝibaj salatoj!

Kial prepari salatojn por bunĝiboj? Mi legis ke ili ne rajtas enveni.

-2° LAV-MAŜINOJ

-7° TRABANTOJ

Ha! Jen la frostigitaj lav-maŝinoj!

Kaj la Trabantoj! Sed ŝlositaj.

Rigardu, tie estas la kuirejo!

Kie? Mi ne vidas ĝin.

Tie, en la supra bild-kesto.

Ni rerampu tien kaj eniru la kuirejon.

Ve, ni rampis al la malĝusta bild-kesto.

KUIREJO

Ne gravas. Ankaŭ ĉi tie aperas la pordo al la kuirejo. Kaj ĉi-kaze ĝi estas jam malfermita.

Des pli bone.

Subite enpaŝas riĉa familio de jam tro dikaj zbrugegoj.

ZBRUGA RESTORACIO

MI MALSATEGAS. TRABANTAN tempo-maŝinon mi petas, kun ekstraj seĝ-rimenoj!

Por mi kaf-muelilan.

Por mi polv-suĉilan, sed sen la polvo.

Feliĉ-menuo por mi. Kun lud-zbrugo.

Ĉu ne elektu lavmaŝinan? Pensu pri via talio!

Mia talio voĉdonas por Trabanto!

Infanoj, ĉu vi elektis?

Ne, ni ankoraŭ diskutas.

Ĉu fligŝuko aŭ bunĝiberoj?..

Kial ne ambaŭ?

Tion ni jam havas hejme. Preferu kun lud-glaĉo.

MENUO

1 Tasko unu: via sumo el naŭ poentoj (po ½):

Diru ĉu la frazoj pri la rakonto estas veraj aŭ malveraj.

1. Nur unu persono vidis la urson en la strato.
2. Du policistoj kaptis la urson.
3. Ili kaptis ĝin tuj kaj tre facile.
4. Ili tuj sciis kion fari pri la urso.
5. La serĝento nomiĝas Steĉjo.
6. Kluĉjo parolis telefone kun la serĝento.
7. La serĝento estis en sia polic-aŭto kiam alvenis la voko.
8. Joĉjo raportis al la serĝento, ke okazas disputo ĉe iu adreso.
9. La serĝento konsilis, ke ili portu la urson al la besto-ĝardeno.
10. La policisto demandis, kial li ne pensis pri tio.
11. La serĝento respondis, ke li ne pensis pri tio ĉar li estas iom stulta.
12. La serĝento vokis al Joĉjo pro solvenda disputo unu horon poste.
13. Joĉjo respondis, ke li tuj iros al la adreso, kie oni disputas.
14. Ni ne scias la nomojn de la disputintoj.
15. La serĝento surpriziĝis, ke Joĉjo ankoraŭ havas la urson.
16. Joĉjo opiniis, ke la urso aparte ĝuis la fokojn.
17. Joĉjo diris, ke ili iros kune tiutage al kinejo.
18. Joĉjo diris, ke ili iros kune al muzeo dimanĉe.

2 Tasko du: via sumo el naŭ poentoj:

Jen naŭ vortoj kaj naŭ truoj en naŭ frazoj. Metu la vortojn en la spacoj.

ĉar, kial, kie, kion, kun, per, por, pri, pro

1. La ŝerco temas ____ urso kiu kuras libere.
2. Kelkaj homoj kuris al policisto, ____ tiu libera besto.
3. La policistoj ne sciis, ____ fari pri la urso.
4. Policisto Joĉjo vokis al sia ĉefo ____ peti konsilojn.
5. Li faris tiun vokon ____ telefono.
6. Fine, la policistoj iris ____ la urso al la besto-ĝardeno.
7. La serĝento petis al Joĉjo iri al adreso, ____ okazas disputo.
8. La serĝento kriis, ____ la policistoj ne lasis la urson en la besto-ĝardeno.
9. La serĝento ne komprenas ____ la policisto ankoraŭ havas la urson.

KVINO KVIZO

Sonja kaj Stefan MacGill

**Legu la rakonton,
kaj respondu la kvin kvizo-
demandojn. Kontrolu viajn
respondojn kaj kalkulu
viajn poentojn!**

Trovita urso

Kelkaj ekscititaj homoj kuris al policisto Joĉjo kaj kriis: "Ni vidis urson en la strato! Tie! Rigardu! Ĝi kuras libere."

Do, Joĉjo vokis kolegon Kluĉjo, kaj kune ili postkuris la urson. Post duon-hora batalado kaj timado, ili finfine sukcesis kapti ĝin. Ili ne sciis kion fari pri ĝi. Do, Joĉjo vokis al serĝento Steĉjo en la policejo: "Ĉefo, Kluĉjo kaj mi trovis urson en la strato. Kion ni faru pri ĝi?"

"Nu!" respondis la serĝento: "Portu ĝin al la besto-ĝardeno!"

"Ha, jes! Kial ni ne pensis pri tio?" demandis la policisto.

"Hmmm." diris la serĝento, kaj rezistis la deziron respondi.

La postan tagon la serĝento vokis la saman policiston Joĉjo kaj petis lin iri al iu adreso kie okazas disputo. Joĉjo respondis: "Volonte mi irus, sed mi devas resti kun la urso."

"Kio!?" kriis la serĝento: "Ĉu vi ankoraŭ havas ĝin? Ĉu vi ne faris, kion mi diris al vi?"

"Jes, ĉefo, certe. Ni portis ĝin al la besto-ĝardeno."


"Kaj...?"

"Ĝi aparte ĝuis la pingvenojn. Do, hodiaŭ ni portos ĝin al kinejo kaj sabate ni portos ĝin al la amuz-parko!"



Feliĉa policisto kaptis feliĉan urson.

Desegnis kaj rakontis: Sonja MacGill (7-jara)





3 Tasko tri: via sumo el dek unu poentoj:

En la dek unu frazoj kaŝas sin dek unu bestoj. Jen ekzemplo:

Joĉjo rigardas por koni la problemon. Kaŝas sin "porko".

Skribu la nomojn de la trovitaj bestoj en la kvadratoj sube, kaj vi legos vertikale ĉe la sago (↓) la nomon de aparte stranga besto, kiu vivas en nur unu lando de la mondo. Kiu estas la besto, tiu lando, kaj al kiu besto ĝi iom similas, kvankam ĝi tute ne estas parenca al tiu besto?

1. Ĉefo, ĉefo! Kolego mia trovis urson – kion ni faru?
2. Ĉu ni kaptu ĝin, sen la certo ke ni eskapos senvunde?
3. Ili sekvu la urson en tiun aleon, oni tie kaptos ĝin pli facile.
4. Mi ne scias kion pensi, mi opinias ke ni kaptu ĝin.
5. Pluraj alkuris helpante, rolantaj kiel krom-policistoj.
6. Kiel ni eskapu de la urso? Konsilu, policisto!
7. Ŝteli mielon por logi la urson? Tio estas riska – rabo de io ajn estas kontraŭleĝa.
8. Ni ne rajtas ĝin peli kanone, eĉ ne pistole.
9. La publiko kuris rapide de l'fenomeno.
10. Jen nia urĝa voko; konsilu nin ĉefo!
11. Ne paniku! Ni kviete studos la problemon por trovi solvon.



4 Tasko kvar: via sumo el dek kvar poentoj:

Jen dek frazo-komencoj kaj dek frazo-finoj. Ligu la fraz-komencojn kun la finoj. Poste, notu la komenc-literon de ĉiu frazfino kaj skribu tion sube en la kvadratoj, por scii kio estas la favorata ludilo de la urso:

- | | |
|---|--------------------------------|
| 1. Post duon-hora batalado kaj timado, ili... | A: vokis policiston Joĉjo. |
| 2. Kluĉjo demandis al la serĝento kial... | B: li devas resti kun la urso. |
| 3. Joĉjo diris ke la urso... | C: iros kune al la amuz-parko. |
| 4. La postan tagon la serĝento... | Ĉ: finfine sukcesis kapti ĝin. |

- | | |
|---|--------------------------------|
| 5. La serĝento surprizite demandis ĉu ili... | D: okazas disputo. |
| 6. La serĝento respondis, ke ili... | E: aparte ĝuis la pingvenojn. |
| 7. Sabate, la urso, Joĉjo kaj Kluĉjo... | F: kinejo. |
| 8. Joĉjo rifuzas la peton de sia ĉefo ĉar | G: li mem ne elpensis solvon. |
| 9. Baldaŭ, la urso iros kun siaj du amikoj al | Ĝ: portu ĝin al besto-ĝardeno. |
| 10. Joĉjo estis petita iri al adreso, kie | H: ankoraŭ havas la urson. |

Skribu la dek komenc-literojn. Kio estas la favorata ludilo de la urso?

□ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □

Prenu dek poentojn por ĉiu ĝuste ligita frazo. Kiel posta tasko, prenu kvar ekstrajn poentojn, se vi sukcesas rearanĝi la dek frazojn laŭ la vicordo de la rakonto.

5 Tasko kvin: via sumo el sep poentoj: □

Jen dek kvar liter-grupoj. Sed ili apenaŭ estas vortoj – ĝis vi rearanĝos la literojn. Trovu dek kvar vortojn el la rakonto. Prenu duonan poenton (½) por ĉiu trovita vorto. Por kontroli ĉu vi sukcesis, skribu la komenc-literojn de la vortoj en la donita ordo en la kvadratoj. Vi legos kion ni supozas pri la supozo de la serĝento pri Joĉjo. Li...

□ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □ □

- | | | |
|-------------|-----------------|---------------|
| 1. vipegono | 6. dresobanĝeto | 11. kamparuzo |
| 2. izistres | 7. ebriel | 12. levoton |
| 3. kisoaz | 8. tiekajtsci | 13. ranaŭko |
| 4. datobala | 9. pioskrust | 14. ĝenroste |
| 5. teapar | 10. presdison | |

Ĉu vi sukcesis? La bildoj de Sonja helpos vin kun la tria tasko! Solvojn vi trovos en la sekva numero kaj (post monato) en nia parto de la biblioteko ĉe <lernu.net>. Nun, kalkulu viajn poentojn por la tuta kvizo:

$$\begin{array}{cccccc} \square & + & \square & + & \square & + & \square & + & \square & = & \square & \times 2 & = & \square & \% \\ \text{el 9} & & \text{el 9} & & \text{el 11} & & \text{el 14} & & \text{el 7} & & \text{el 50} & \text{duobligu tion por procentaĵo!} & & & \end{array}$$

Interkultura



Rubrikestro: Elena Nadikova,
E-klubo „Betuleto”,
Lernejo/Ŝkola 56,
pr. Traktorostroitelej, 38
RU-428028 Ĉeboksari, Rusio.

Saluton, karaj amikoj! Kiel vi scias, en Esperantujo okazas multaj diversaj aranĝoj. Inter ili estas sciencaj, kulturaj, neoficialaj kaj eĉ senprogramaj. Nia rubriko laŭ sia nomo nature preferas kulturajn aranĝojn kaj volonte kaj kun plezuro rakontas pri ili. La nuna numero estas dediĉita al unu kultura – eĉ interkultura – aranĝo – EoLa.

Kio estas EoLa? “Esperanto – Lingvo Arta”; jen festivalo de artoj en Esperanto. Kutime ĝi okazas dum la fino de februaro aŭ komenco de marto ĉiujare en diversaj urboj kaj regionoj de Rusio. Ĝi jam okazis dekkvinofoje.

Ĉiu EoLa havas sian propran specifecon. Sed mi opinias, ke la organizantoj ne kontraŭos, se mi diros, ke la ĉefa celo de la aranĝo estas **krei Esperantan Kulturon en diversaj ĝiaj elmontraj.**



Ja nia kulturo, kiel kulturo ĝenerale, estas nocio ampleksa kaj tre divers-forma. Vi povos konvinkiĝi en tio, se vi enrigardos en la programojn de EoLa. La organizantoj ĉiam faras ilin variaj kaj interesaj. La ĉefa temo fakte jam estas markita en la nomo de la aranĝo – artoj en Esperanto.

La nepraj partoj de ĉiu EoLa estas koncertoj, diversaj artaj konkursoj (muzikaj, poeziaj, kantaj ktp.) kaj teatraĵoj. Ĉu vi volus ekzemple provi mem roli en pantomima prezentaĵo? Aŭ lerni en metiejoj (inkluzive popolajn) kaj fari iujn aĵojn per propraj manoj? Aŭ simple ludi, danci diverspecajn dancojn aŭ ekzerci sin en tradukado? Tiukaze bonvenon al EoLa! Krome, la partoprenantoj nepre vizitas lokajn vidindaĵojn, konatiĝas kun la historio, evoluo kaj kulturo de tiu urbo, kiu gastigas la aranĝon. Ja vi konsentos, karaj legantoj, ke ne ekzistas


neinteresaj lokoj sur nia planedo. EoLa estas ja ne nur kultura, sed ankaŭ *interkultura* aranĝo. Ĝi penas prezenti diversajn kulturojn de la mondo. Tiel, dum EoLa-15 en Novosibirsko en 2003 okazas prezentado de angla ĉambro.



Al la gastoj oni rakontis pri Anglio, ĝia lingvo kaj la brita reĝa familio. La partoprenantoj klarigis, ke unu el la plej popularaj herooj de la angla literaturo estas Sherlock Holmes. Ĉiu eolano povis senti sin detektivo kaj partopreni en esplorado de mistera morto.

Ankaŭ en la ĉi-jara EoLa partoprenis interesaj gastoj. Ili prezentis tre neordinaran arton *kapoejron* - danco-batalon (vidu la bildon sube). Ĝi naskiĝis en Brazilo, kiam tie ekzistis sklaveco. Negroj-sklavoj penis savi sin kaj sian kulturon kaj kreis specifan arton- dancon kun batalo.


Ĝi estis originala protesto kontraŭ sklavigo kaj sklavigistoj. Ĝi helpis al ili resti vivaj. Nun grupo de junaj homoj el la urbo Niznij-Novgorod elektis kapoejron kiel vivmanieron por si. Do, Rusion kaj Brazilon disigas miloj da kilometroj, eĉ oceano, sed kulturo ja tute ne scias limojn, ĉu? Precipe kulturo per Esperanto, kion ni vidas ĉiutage.



Vizitu la hejmpaĝon Interkulturo! Vizitu la kvizojn, la forumon, ktp. Anonce vian grupon. Komparu vian vivon kaj ŝatojn kun tiuj de aliaj grupoj en aliaj landoj kaj kulturoj. Malkovru la diferencojn inter vi, kaj trovu ankaŭ tion, kio estas inter vi komuna!

www.interkulturo.net

Alia prezentaĵo (sur la foto) temis pri la fabeloj de Hans Christian Andersen.



La organizantoj penas konsideri variecon de viv-opinioj, viv-manieroj kaj mem-konscioj. Ekzemple, unu el la renkontiĝoj EoLa proponis la ĉeftemon *Malsame!* Temis pri diversaj viv-stiloj. Krome, EoLa inkluzivas ankaŭ klerigan parton, kun divers-temaj lekcionoj, seminarioj kaj diskut-rondoj.

La naskiĝo de EoLa en Rusio ne estas mirinda, sed natura. Ĉar en Rusio loĝas preskaŭ cent nacioj kaj ĉiu havas proprajn lingvon, kulturon kaj tradiciojn. La sama situacio ekzistas en multaj regionoj de nia mondo.

Al la redakcio de *Juna Amiko* estus tre interese ekscii pri similaj (aŭ tute aliaj!) kulturaj kaj multkulturaj aranĝoj. Do, karaj amikoj, komuniku al aliaj legantoj pri viaj impresoj. Rakontu pri *kulturo per Esperanto* por disvastigi nian Interkulturan Mondon!



Saluton! Ĉu la libro de rekordoj Guinness? Bonvolu ligi min kun la redaktoro...

Nia tria gasto...
Bonvenigu la mond-faman... Kok Kino!
Bonvolu sidigi tie inter Elton kaj Madonna.



Koran dankon, Jay! Mi ĝojas ĉeesti.

Kie estu la unua ovo-ekspozicio?
Nov-Jorko aŭ Barcelono aŭ...?

ABONOJ por juna amiko en 2008 restas bonvenaj!

	1 ekz.	Ekde 3
Tarifo 1	€ 14	po € 11
Tarifo 2	€ 9	po € 7

Kaj nun, ĉu vi kunportis vian mirindan ovon? Bonege. Post la reklama paŭzo vi montros ĝin kaj klarigos kiel vi sukcesis demeti ĝin...

En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literatura heredaĵo dank' al la plumo de nia fidela amiko, el-stara islanda poeto, Baldur RAGNARSSON. Konsciu, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel-konscia esperantisto, sukcesa pledanto por nia nobla ideo. (Red.)

26 Stanislav Schulhof (1864-1919)

Stanislav Schulhof [Ŝulhof] apartenas al tiuj sindonemaj esperantistoj, kiuj sin dediĉis al diskonigo de Esperanto kaj al krea laboro en la lingvo dum la unuaj jardekoj de la lasta jarcento. Li estis ĉeĥo kaj laboris kiel dentisto en la urbo Pardubice, ĉe la rivero Elbo, 104 kilometrojn oriente de Prago, kie li mortis en 1919. Tie li vigle partoprenis la lokan esperantistan vivon kaj propagandis la lingvon per multaj artikoloj. En tiu urbo aperis en 2004 dokumenta verko pri lia vivo: *Vivo kaj verko de D-ro Stanislav Schulhof* de Jarmila Rýznarová.

Schulhof estis poeto kaj aperigis tri volumetojn da poemoj, kiuj meritas atenton kiel sinceraj esprimoj de lirikismo, grandparte ombrita de melankolio kaj pesimismo. Tiuj poemoj, kiuj enhavas entute nur 30 poemojn, aperis antaŭ la unua mondmilito, en du sinkvaj jaroj, 1911 kaj 1912. Verŝajne li post tio ĉesis sin okupi pri originala verkado, sed sin turnis al tradukado de poemoj el la ĉeĥa lingvo. Kolekto de 30 poemoj de 15 ĉeĥaj poetoj aperis

nur post lia morto, en antologio nomita *Bohemaj Grenatoj* (1920).

BILDOJ EL LA HISTORIO

Pri la tri poemoj de Schulhof: *Per Espero al Despero* (1911), *Kion la Vivo alportis* (1911) kaj *Aŭtunaj floroj* (1912) Kalocsay bele kaj kortuŝe verkis multajn jarojn poste en *Literatura Mondo* (1922): "Plenmano da versoj, granda promeso portita en la fruan tombon... kara malfeliĉa poeto, kara malsana doktoro, kortuŝite mi ekkarezas vian memoron." Li konstatas konstantan evoluon kaj pliperfektigon, ekde iuj ritmaj kaj lingvaj stumbloj en la unua volumo ĝis la veraj literaturaj perloj en la lasta. Mauro Nervi (en Arkivo de EVA, 2005) mencias la fluan esprimadon de liaj poemoj laŭ la kutimo de nia frua poezio, sed atentigas pri surprizaj poemoj, "kiuj pruvas lian realismon kaj pesimismon, ankaŭ koncerne Esperanton mem."

Sian poemon *Desperanto* Schulhof komencas per identigo de Esperanto kun la esenca Espero mem: *Dolĉe sonas via nova nomo, / ho Espero! nia bela vorto!*, sed finas ĝin per neevitebla pesimismo pri la homo mem, ke eĉ en malproksima futuro *"tiam ree homon batos homo, / sed li batos lin en via nomo / ankaŭ kun la stelo sur standardo"*. Post preskaŭ cent jaroj la pesi-

senindulga, ĝi ligis la poeton per katenoj el kiuj li ne havas ajnan esperon liberiĝi, kvankam li multfoje klopodis eskapi, sed li ne povas, ĉar lia vivo apartenas al la lingvo kaj moro, kiun ĝi alportas. La poemo havas kvin kvinversajn strofojn. Jen la dua strofo, kiu priskribas la vanajn penojn de la poeto liberiĝi el sia sklaveco:

LITERATURO DE LA ESPERANTA

mismo de la poeto ŝajnas daŭre reala pri la homa raso. Estas inde kompari tiun poemon de Schulhof kun la fama poemo *En amara horo* de Kalocsay, kies pesimismo finiĝas per *"Ne!"*, per kiu li rifuzas lasi la esperon pri Esperanto malgraŭ la senideala mondo: *"Vi estas la konsolo en nia mond' amara!"*

En sia lasta poemaro, *Aŭtunaj floroj* Schulhof jam atingas plenan evoluon maturecon kiel poeto. La titolo estas melankolia, sed ne pesimisma, kio kongruas kun la tono de la poemoj, doloro certe ne forestas, sed ekvilibras kun ia pensa energio, kiu plej klare aperas en la plej fama poemo de Schulhof, *Kanto de l'sklavo*. La temo de tiu poemo estas Esperanto, kiun la poeto rigardas kiel sian absolutan mastron kaj sin mem kiel ĝian sklavon. Tiu mastro estas

*Multfoje mi forĵetis mian plumon,
eĉ emblemon vian, stelon kvinradian,
en la koro fajron mi estingi penis,
sed vi senkompate ĉiam min ekprenis
kaj min pluen, pluen trenis, sklavon vian.*

En la lasta strofo, per vortoj ege trafaj, eĉ korŝiraj, la poeto klarigas la esencon de la mastra potenco de Esperanto kaj de tio, kion ĝi prezentas: nova moro de humana, nobla konduto de la homoj:

*Pli kruelan, ol la famaj uzurpantoj
vi alportis al ni en la mondon moron;
ili piedbatis homajn liberecojn,
de la landoj ŝiris partojn, limojn,
pecojn,
sed vi ŝiras el la brustoj nian koron.*

La poemoj de Schulhof ankaŭ nun atingas nian koron. Cent jaroj pasis, sed li estas ankoraŭ kun ni.

VERDA PAĜO

FAKTOJ KAJ ARGUMENTOJ PRI ESPERANTO

Omaĝe al la Internacia Jaro de Lingvoj

Laŭ decido de Unuiĝintaj Nacioj (UN) 2008 estas la JARO DE LINGVOJ. La esperantistaro akceptis la decidon kun granda ĝojo, ĉar **la komunikado en- kaj translanda bezonas apartan atenton**. Kial?

De jaro al jaro mortas etnaj lingvoj. Ilia nombro – laŭ UN – baldaŭ atingos 3000 ! Tio estas terura perdo, ĉar kune kun la lingvo preskaŭ ĉiam malaperas ankaŭ la kulturo de la koncerna etno. Tio estas grava perdo por la homaro, ĉar ĉiu etno havas ion speciale propran, kio formortas kun la lingvo: portanto de la kulturo de miljaroj. **Estas dezirinde konservi la buntecon de kulturoj**, ĉar tio ofte estas fonto de plua evoluo.

Sed ni konsciu pri tio, ke nur tre malmultaj forĵetas sian gepatran lingvon, se ĝi bone servas en ilia komunikado. Lingvo mortas ne de unu tago al alia. Unue, montriĝas, ke la posedo de iu “fremda” lingvo estas tre utila kaj profito-dona. Poste, iom post iom ĝi fariĝas ne malhavebla, dum la denaska jam servas nur la hejman familian komunikadon. Post du, tri generacioj oni konstatas: viv-teni la lingvon de la praavoj kostas tro multe, estas pli utile elspezi tiun sumon por efektiviĝi pli urĝajn celojn. Tio, fine, rezultigas la nunan tendencon.

Per alproprigo de iu negepatra lingvo vole-nevole akiras superecon ankaŭ la popolo de la elektita lingvo. Ĝi fariĝas subkonscia idealo, des pli ke la elektita nacia lingvo por la plimulto ne estas perfekte alproprigebla.

Male, kiam por transnacia komunikado oni elektas neŭtralan lingvon, nome Esperanton, povas aperi la supereco de neniu popolo, ĉar ĉiu alproprigas ĝin per pli-malpli egala forto-streĉo, kaj ni tuj aldonu, ke ties alproprigo bezonas ĉirkaŭ kvinonan fortostreĉon.

Per tiu vojo oni ŝparus superflujajn elspezojn kaj realiĝus vera lingva, komunikada demokratio. Krome, la neŭtrala internacia lingvo estus efika protektilo de malgrandaj etnaj lingvoj endanĝerigitaj.

Geza Kurucz, Hungario

Nguyen Thi Ngoc Lan
vjetnama esperantistino



ESPERANTO KAJ MI

Esperanton mi ekkonis en 1960, kiam la Vjetnama Pac-defenda Esperanto-Asocio (VPEA) fariĝis fako de mia oficejo, kiu estas la nuna Unio de Amik-ecaj Organizoj. Tiam mi laboris ĉe la fako de ties eksteraj rilatoj. Pro amo al fremdaj lingvoj kaj la nobla celo de la kreinto de Esperanto mi treege deziris ĝin lerni, sed tiu-tempe mi ne povis pro troa okupiteco.

Poste, en 1989 mi hazarde renkontis la sekretarion de VPEA en la oficejo de Hanoja Unio de Turismo, kies ano mi estis. Sciante ke li gvidas la tiean Esperanto-kurson, mi esprimis mian deziron viziti ĝin. Post la 9a leciono la kurso ĉesis. La restantajn lecionojn mi mem lernis, kaj trapasis sukcese la bazan ekzamenon kune kun la anoj de la kurso por junaj ĉiĉeronoj. Poste mi aliĝis al la nov-fondita klubo de Esperanto, kaj partoprenis en speciala progresiga kurso. Dume mi havis okazon gvidi karavanon de polaj kaj rusaj esperantistaj turistoj.

De 1990 ĝis 2001 mi fervore agadis por la movado kiel komitatano de *Hanoja E-Klubo*, kaj de 1996 ĝis 2004 por *Vjetnama E-Asocio* (VEA). En 1997, kunlabore kun alia esperantisto, mi verkis lerno-libron por vjetnamaj komencantoj. En 1999, dank' al miaj helpemaj japanaj amikoj, mi ekgvidis kurson por blinduloj, kaj daŭrigas la instruadon ĝis nun.

En mia jun-aĝo mi ofte havis kontakton kun ali-landanoj parolantaj la francan kaj anglan lingvojn, sed kun neniu mi amikiĝis. Male, de kiam mi esperantistiĝis, mi havas abundan rilaton kun eksterlandaj samideanoj, el kiuj mi fratiĝis kun japano kaj usonanino. Miaj japanaj amikoj donis al mi belan ekzemplon de sindonema agado por la movado kaj multe helpis min en mia E-kariero. Unu el ili efektive helpis fondi la brajlan bibliotekon en Hanojo, la ĉefurbo de mia lando.

Esperanto estas vere mirinda internacia lingvo, kiu ĝojigis mian vivon, ĝi alportis al mi bonajn amikojn el la mondo, donis utilajn informojn kaj ebligis al mi prezenti mian landon. La amikeco, helpemo kaj fervora aktiveco de la monda esperantistaro estas admirindegaj, ili profunde impresis min.

Elkoran dankon al Zamenhof pro lia valorega kontribuo al la homaro. Mi esperas, ke Esperanto estos parolata en la tuta mondo kaj ĝi alportos translandan amikecon, eternan pacon kaj prosperon al la homaro.



MIRINDAĴOJ DE LA MONDO

Certe iam vi jam aŭdis aŭ legis pri la „Sep mirindaĵoj de la mondo“. Antaŭ pli ol 2000 jaroj la greka filozofo Filono prezentis liston de konstruaĵoj, kiujn en sia tempo li konsideris kiel la plej imponaj kaj vidindaj. Kiel li faris tiun liston, oni ne scias. Pli poste estiĝis ankoraŭ aliaj listoj, kiuj enhavis pli da konstruaĵoj. Sed ĝis hodiaŭ ni agnoskas la liston de Filono. Tiuj „Sep mirindaĵoj“ estas: La Piramidoj en Gize, La pendantaj ĝardenoj de Semiramiso, La statuo de skulptisto Feidaso en Olimpio, La temploj de Artemiso en Efezo, La Maŭzoleo en Halikamaso. La Koloso de Rodiso kaj La lum-turo sur la insulo Faruo. Bedaŭrinde, hodiaŭ ekzistas nur unu el tiuj mirindaĵoj – La piramidoj en Gizo.

Al la sviso Bernard Weber venis la ideo elekti novajn „Mirindaĵojn“. Oni alvokis ĉiujn homojn fari proponojn por tiuj „miraklaĵoj“. Oni devis plenumi jenajn kondiĉojn: la proponita konstruaĵo estu konstruita antaŭ la jaro 2000 kaj devas esti ankoraŭ en sufiĉe bona stato. Alvenis multaj proponoj. Post kvar jaroj oni elektis 77 objektojn, kiuj ricevis plej multe da voĉoj. Poste speciala ĵurio elektis 21 objektojn por fina voĉ-donado.

Partoprenis multaj milionoj da homoj el la tuta mondo. Fin-fine, en la somero de 2007 (interesa dato: 07.07.07.) oni prezentis en Lisbono (Portugallio) la „Sep novajn mirindaĵojn de la mondo“. Jen ili estas:



1. **La Granda Ĉina Muro.** Ĝi estas pli ol 5700 kilometrojn longa. Oni konstruis ĝin en la 5a jar-cento a.K. por defendi sin kontraŭ aliaj popoloj.
2. **La Statuo de Jesuo Savanto en Rio-de-Ĵanejro (Brazilo).**




La statuo troviĝas en alteco de 710 metroj super la urbo. Ĝi estas 38 metrojn alta kaj pezas pli ol 700 tunojn. Ĝi estis fin-konstruita en la jaro 1931.

3. **La Koloseo en Romo (Italio).** Temas pri granda amfiteatro konstruita ĉirkaŭ la jaro 72 p.K. kun 50 000 sid-lokoj. Genia sistemo de enirejoj ebligis, ke oni povis plenigi aŭ malplenigi la tutan konstruaĵon en nur 15 minutoj.


4. **La Taĝ-Mahalo** (Hindio). Ĝi estas granda maŭzoleo en la urbo Agra. Oni komencis konstrui ĝin en la jaro 1631. Pri ĝi oni diras, ke kiu vidis ĝin, neniam plu povas esti malfeliĉa.



5. **La Roka urbo Petra** (Jordanio). Temas pri domoj elskulptitaj el roko kun belaj fasadoj. Ĝi devenas el la jaroj ĉirkaŭ Krist-naskiĝo.



6. **Machu Picchu** (Peruo). La laŭdire sekreta ĉef-urbo de Inkaoj estis dum jarcentoj forgesita. La celo de la 216 konstruaĵoj sur terasoj ĝis nun ne estas klarigita. Oni komencis la konstruadon ĉirkaŭ la jaro 1450. La konstruadon finis, en la jaro 1532, la Hispanoj, kiuj tiam konkeris la Inkaan regnon.
7. **La ruinoj de la urbo kaj la piramido en Chichen Itza** (Meksiko). Oni trovis ilin en la jaro 1843. La riĉe ornamitaj konstruaĵoj estis konstruitaj ver-ŝajne inter la jaroj 435-455 de Majaoj. Sed jam post 200 jaroj oni forlasis ĝin.



Ĉu eble iuj el vi partoprenis ankaŭ la voĉ-donadon? Kiun mirindaĵon vi estus elektinta? Certe ekzistas ankaŭ multaj aliaj konstruaĵoj, kiuj meritis eniri la liston. Sed jen milionoj da homoj decidis kaj ni akceptu tiun decidon.

Dieter Berndt, Germanio

ĈEN-RAPORTO

Rubrikestro: Saliko, Finnlando



SPORTO EN BRAZILO

Brazilanoj praktikas plurajn specojn de sporto, ĉefe futbalon, la plej konatan el ĉiuj en la tuta mondo.

Kvin-foje Brazilo gajnis la mond-pokalon: 1958, 1962, 1970, 1994 kaj 2002.

Ĝi estis vic-ĉampiono dufoje: 1950 kaj 1998. Ankaŭ gajnis sep amerikajn pokalojn.

Kiu ankoraŭ ne aŭdis paroli pri la famaj brazilaj futbalistoj Pelé, Ronaldo, Ronaldinho, Zico?

Krom futbalo, preferataj sportoj en Brazilo estas ret-pilko, plaĝo-retpilko, korbo-pilko, vet-kurado kaj teniso. Aliflanke, estas tie ĉi alia sporto (mikso de danco kaj lukto) kiun la afrikaj sklavoĵoj kunportis en la 17a jarcento, kies nomo estas Kapoejro.

En 1972, Nacia Sport-Konsilio establis kapoejron kiel sporto-specon, donante al ĝi specialajn regulojn por konkuroj. Pere de Brazila Boks-Konfederacio, ĝia praktikado, kiel sporto, estis oficiale reguligita. Oni trovas kapoejristojn ĉefe en Ŝtato Bahio, nord-orienta regiono de Brazilo.

Spektu du filmetojn pri Kapoejro pere de subaj retadresoĵoj:

<http://www.youtube.com/watch?v=RE9KnoD6y2A&feature=related>

http://youtube.com/watch?v=_g-jt4jewA

La tekston verkis *Liette Lêla*, Brazilo.

Reviziis ĝin *Célio Freitas Martins*.

Por trovi aliajn raportoĵojn, vizitu nian hejmpaĝon sub "ĉenraportoĵoj" : www.junaamiko.inf.hu . Se via lando ne raportas, fariĝu vi raportanto.

plaĝo: apudlaga loko por feriantoj / *pokalo*: trinko-vazo el valora metalo donacita al venkinto en konkuro / *sklavo*: senrajta homo.

LU DU

kaj
ekzecu
vin per
novaj
vortoj!

Kreu almenaŭ 10 novajn vortojn, ŝanĝante ĉiam nur po unu literon.

Ekzemploj: *arbo* > *arto*, *sal*o > *sako*, *bal*o, *val*o, *sap*o, *sav*o; *vir*o > *mir*o, *pir*o, *ti*ro/l, *vip*o, *vico* ...

Jen estas dek vortoj, el kiuj vi devas krei almenaŭ po unu vorton, sed gajnos tiu, kiu povos krei plej multajn (se vi ludas en grupo). Sukcesojn!

<i>mar</i> o	<i>ur</i> bo
<i>kap</i> o	<i>kor</i> o
<i>kor</i> po	<i>kas</i> o
<i>lib</i> ro	<i>vet</i> ero
<i>vent</i> o	<i>tab</i> lo

Se la ludo plaĉas al vi, elektu vortojn, kaj ŝanĝante ĉiam unu literon, ludu kun viaj amikoj.

Geza Kurucz, Hungario

La 22an de Januaro 2008
mortis

CLAUDE PIRON
nia kara svisa Esperanta
verkisto kaj pedagogo

Frاندaj esprimoj kun HUNDO

hunda fideleco

(sindona, absoluta fideleco)

hunda vivo

(mizera vivo)

Bojanta hundo ne mordas.

Ne timu hundon bojantan,

timu hundon silentan.

(Kiu minacas, ne estas danĝera.)

Por hundon dronigi,

oni nomas ĝin rabia.

(Oni ĉiam trovas pretekston por malutili malamaton.)

Mordemaj hundoj kuras ĉiam

kun vundoj.

(Malpaculon ĉiu batas.)

Se al hundo mankas nenio,

ĝin atakas rabio.

(Homo en senzorga stato ofte perdas la sobrecon.)

Hundo, gardanta du pordojn,

restos malsata.

(Oni ne povas servi du mastrojn samtempe.)

Hundo bojas, homo vojas.

(Ne atentu pri ĉies parolo.)

Vivi kun iu kiel hundo kun kato.

(Malbone kunvivi.)

Kiu hundon mian batas,

tiu min mem ne tre ŝatas.

(Kiu ne ŝatas mian proksimulon, nek min tiu ŝatas.)

Oni lin konas

kiel makul-haran hundon.

(Pro akraj kritikoj li estas tre konata.)

Bildoj el la historio de ESPERANTO

VII. Komunikado en Esperantio

Esperantistoj ĝis 1905 formis societojn lokajn kaj landajn, kaj en Bulonjo aperis pretendo ankaŭ por monda strukturiĝo. Evidentiĝis ripeto de tiu internacia, monda kongreso, kiun partoprenis 700 personoj, kaj oni tuj faris preparojn por la sekva. Ekde tiam ĉiujare okazas kongresoj, escepte la militplagitajn jarojn (1916-19, 1940-46). La nombro de la partoprenantoj estis plej malalta en la Pariza kongreso de 1914, ĉar pro la eksplodo de la milito la plimulto eĉ ne atingis la urbon. La plej altan nombron – preskaŭ 6000 – atingis en Varsovio en la jaro 1987, kiam oni festis la centjariĝon de la lingvo.



Laŭ la Bulonja Deklaracio „*esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu*

scias kaj uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiuj celoj li ĝin uzas.” Do la kongresojn rajtis partopreni iu ajn. Kvankam nenio valoris tiom, kiom personaj kontaktoj, ĉiam nur ono de la esperantistaro povis kaj



volis partopreni ilin. Ja en la postaj jardekoj esperantistoj povis elekti el pli kaj pli da internaciaj kongresoj, renkontiĝoj, seminarioj, kunvojaĝoj, ktp. Krome rapidiĝis la evoluo de la komunikado, kiu ebligis kontaktojn ankaŭ sen persona, fizika ĉeesto. Komence esperantistoj korespondis surpapere, poŝtletere, poste disvastiĝis telefonio. En la lastaj du jardekoj tutmondiĝis elektronika korespondado, kaj retletero iĝis ĉiutagaĵo. Ape- ris la ebleco rete vidi, eĉ aŭdi la

partneron, tamen la necesaj iloj ankorau ne disvastiĝis amase.

En la historio de la etnaj lingvoj la buŝa lingvouzo estis ekskluziva dum



jarmiloj. Kvankam la skribo aperis antaŭ jarmiloj, ĝi longe restis privilegio de malmultaj. Eĉ hodiaŭ kvarono de la homaro konsistas el analfabetoj. La historio de la Internacia Lingvo estas inversa: ĝi aperis skribe kaj apud ĝi paŝon post paŝo plioftiĝas la buŝa lingvo. Ekzistas tamen homoj, kiuj nur skribe uzas ĝin.

Krom interpersona uzado de la lingvo dekomence estis grava faktoro la amaskomunikado, precipe per periodaĵoj. Zamenhof mem planis la unuan periodaĵon kun la titolo *Internaciulo*, sed la cenzuro malpermesis ĝin antaŭ la apero. Tial nur en 1889 aperis la unua periodaĵo *Esperantisto* en Nurenbergo (Germanio), kie la aferon de la lingvo subtenis eksvolapukistoj. La monata revuo *Lingvo Internacia* (1895-1920) iĝis la ĉefa movada periodaĵo, aperinta en Svedio, Hungario kaj fine en Parizo. En la postaj jar-

dekoj la Esperant-lingva tradicia gazetaro iĝis pli kaj pli ampleksa kaj bunta. Ĉirkaŭ la jaro 2000 ĝia kresko haltis, ĉar aperadis ret-gazetoj kaj informaj retejoj. Nuntempe pluraj periodaĵoj havas kaj paperan, kaj retan eldonon, aliaj ŝanĝis la paperan al reta.

Komence de la 20-a jarcento plurloke oni ekkolektis Esperantajn periodaĵojn kune kun libroj kaj diversaj aliaj dokumentoj. Aparte menciindas la kolektaĵo de Aŭstria Nacia Biblioteko (Sammlung für Plansprachen und das Esperantomuseum) ĉar ĝi estas la plej granda kaj pluraj servoj estas atingeblaj ankaŭ rete

(www.onb.ac.at/plansprachen.htm)

Esperantistoj estis inter la pioniroj de la radioamatora movado. La unuan longdistancon Esperantan kontakton ili faris en 1920 inter Nov-Zelando kaj Versajlo (FR). Esperantlingvajn programojn la unuan fojon dissendis radio-stacioj Londono (GB) kaj Newark XYZ (US). Ĝis 1938 okazis pli ol 26 mil Esperanto-elsendoj, la plej multaj en Germanio, Francio, kaj Sovetio. Post la dua mondmilito multaj stacioj rekomencis la elsendojn, kies nombro kreskis ĝis la jaro 1968, produktante pliajn 26 milojn. Post tiu kulmino malkreska tendenco daŭris ĝis la nova jarcento, kiam apud la restintaj tradiciaj radio-elsendoj ekfunkciis ankaŭ Esperantaj retradioj. Nuntempe elsendojn oni arkivigas kaj ili estas reaŭskulteblaj rete

(<http://radioarkivo.org>).

Konversaciaj temoj

help-materialo
por
ekzamenotoj

Rubrikestro: Judit Felszeghy

I. Planado pri ĝardeno

- Mi deziras aranĝi la ĝardenon, vi jam havas spertojn, ĉu vi bonvolus helpi min?
- Volonte... sed kiel komenci? Kion vi deziras, ĉu frukt-arbojn, kolorajn arbustojn, florojn, gazonon?
- Ĉu fruktarbojn? Jes, mi ŝatas pomon, piron, ĉerizon, juglandon...
- Do, ni aĉetu... hm... ĉerizarbon, vi povos planti ĝin jam nun, tie, malantaŭ la domo. Jugland-arbo kreskas malrapide, sed kiam ĝi havos grandan branĉaron, vi povos loki ĝardenajn seĝojn, tablon, kaj ripozi en ĝia ombro. Sed la ceteraj plantoj malbone fartas sub ĝi.
- Bone, dankon. Mi ali-loke kultivos do legomojn, antaŭ la ĉerizarbo. En la kuirejo ofte necesas freŝaj karoto, petroselo, kapsiko, tomato, brasiko, kelkaj spic-herboj. Ĉu jam semi ilin?
- Ne ĉiujn. La semojn de kapsiko kaj tomato metu unue en malgrandajn ujojn kun fekunda grundo, kaj transplantu la plantidojn en la legom-bedojn nur kiam ili jam havas kelkajn folietojn.
- Mi deziras kelkajn belajn, bon-odorajn florojn tie, antaŭ la teraso. Mi pensas pri rozoj, lilioj, tulipoj, krizantemoj...
- Tri-kvar long-tigajn rozujojn ni povos stiki en la suda flanko, ĉar ili preferas sunon. Antaŭ ili ni enŝovu en la teron la bulbojn de tulipoj kaj lilioj. Inter la tulipoj ni povas semi buntajn unu-somerajn florojn, ili floros, kiam la tulipoj kaj lilioj jam estos forvelkintaj. Aŭ, ĉu vi preferas havi ilin en flor-bedoj?
- Mi pensas, ke ili pli bone fartos inter la aliaj floroj, kaj krome, tiel ili pli plaĉas al mi. Ĉu komenci ankaŭ la semadon de gazono?
- Oho! Atendu! Rigardu, kiel malglata kaj plena de trud-herboj estas tiu parto, kie vi deziras silkan, freŝan gazonon! Unue necesas eltiri la trudherbojn, fosi la grundon kaj poste rasti ĝin. Krome, post la semado enbatadi la semojn en la grundon... kaj ĉiu-tage aspergi ĝin per akvo, kaj kiam la herboj jam estas dek centimetrojn altaj, tondi ilin regule...



- Ho, sufiĉas! Mi ne havos tiom da tempo!
- ... aŭ tiom da emo... Ja necesas rastru ankaŭ la legomojn sufiĉe ofte... kaj aspergadi viajn fruktarbojn kaj roz-arbustojn per kontraŭ-insekta kaj kontraŭ-funga kemiaĵoj!
- Ho, jen... Ne ekzistas rozo sen dorno, kaj ĝardeno sen peno.... Do, ek! Ni komencu!
- Per kio?
- Ni plantu tujon. Ĝi jam estas aĉetita.

DEMANDOJ KAJ TASKOJ

Vicigu, kia-specaj floroj, legomoj, arboj estas en via ĝardeno, aŭ, kia-specajn vi plantus. Priskribu, kiujn laborojn necesas plenumi en ĝardenoj printempe, somere kaj aŭtune. Rakontu aŭ skribu al ni leteron pri via – aŭ imagita de vi – ĝardeno: kio, kie troviĝas en ĝi, kion vi ŝatas, kion vi deziras ŝanĝi en ĝi!

II. Plantado

- Eligu ankoraŭ pli da tero el la truo, ĝi ankoraŭ ne estas sufiĉe granda kaj profunda!
- Rigardu! Sed ja sufiĉas, se mi enmetas la tujon, jam ne elstaras ĝiaj radikoj...!
- Sub la radikojn ni metos ankoraŭ organikan sterkaĵon kaj bon-kvalitan kompoŝton el tiuj sakegoj... jen, tiel! Tenu la trunketon delikate, dum mi remetas kaj stamfas la grundon ĉirkaŭ ĝi... nu, farite! Nun ni enŝovas apud ĝi ĉi tiun baston-egon kaj ligas al ĝi la tujon. Donu al mi la ŝnuron! Ĝi kuŝas en la korbo!
- Jen! Ĉu mi alportu akvon en sitelo, aŭ ni akvumos per la tubo? Mi malfermos la kranon.



- Alportu prefere akvumilon, mi verŝetas akvon nur ĉirkaŭ la trunketo, jen, mi faras grundteron por la akvo. Tiel oni malhelpas ĝin disflui...
- Do, finite! Mi reportas la ĝardenilojn en la kameron...
- Atendu iomete. Donu al mi la rastilon, por iom glatigi la teron, kie ni fosis.
- Ĝi estas apogita kontraŭ la muro, malantaŭ vi! Sed mi faros tion, vi jam multe laboris.
- Kaj kion nun? Per kio daŭrigi la ĝardenumadon? Ĉu fosi kaj prepari la legom-bedojn por semado?
- Ho, ne! Ne tiom haste! Ni lasu farendojn ankaŭ por la sekvaj tagoj! Nun ni ripozu, kaj imagu, kiel bela, alta estos

Daŭrigo sur la sekva paĝo

tiu ĉi tujo post jaroj! Ĝi donos iom da ombro kontraŭ la fenestro kaj kaŝ-lokon por birdoj, kiuj povos konstrui neston inter ĝiaj branĉoj... Ĉirkaŭ ĝi estos agrabla gazono, kaj en la alia flanko fruktarboj proponos siajn dolĉ-sukajn fruktojn... Per kio vin regali?

– Dankon, sed ĉar fruktoj ankoraŭ ne estas, preparu tason da frukto-teo, mi petas!

DEMANDOJ, TASKOJ

Vicigu, kia-specaj ĝardeniloj necesas por plantado. Vicigu kelkajn argumentojn kial planti arbojn en ĝardenoj, parkoj, laŭlonge de vojoj kaj stratoj. Skribu al ni leteron, en kiu vi rakontas pri plantado de arbo.

arbusto: planto malpli alta ol arbo / aspergi: delikate, plur-gutete eligi akvon, likvajon / bedo: peco de grundo, preparita por iu plantaro / bulbo: subtera glob-forma tigo / bunta: mult-kolora / ĉerizo: dolĉa ruĝa glob-forma frukteto / domo: branĉo-pikilo / fekunda: grand-kvante naskanta, produktanta / gazono: zorge kultivata herbo-tapiŝo / hasta: senatente rapida / juglando: frukto en osteca ŝelo / kamero: senfenestra tenejo / kapsiko: kapo-forma legomo el multaj folioj / karoto: legomo kun ruĝa radiko subtera / kompoŝto: aro da plant(restaĵ)oj teriĝintaj post 2-3 jaroj / krano: tubo-fermilo / krizantemo: aŭtuna blanka floro / kultivi: prilabori plantojn, fruktarbojn / lilio: ruĝe-blua floro printempa / organika: rilata al karbon-kombinaĵoj / petroselo: legomo simila al karoto kun blanka radiko / rasti: kunkolekti falintajn foliojn, falĉitajn herbojn per laŭcela ilo / rastro: fosilo kun tri-angulafer-plato / regali: trakti iunper manĝaĵo kaj trinkaĵo / sitejo: cilindro-forma granda akvujo kun movebla duon-cirkla tenilo / stamfi: pied-bati grundon / sterko: bestofekajo miksitaj kun pajlo, uzata por fekundigi grundon / stiki: planti detranĉitan branĉon / teraso: apuddoma ebenaĵeto por manĝi kaj trinki tie / tomato: ruĝa sukoplenta frukto de planto / trudi: devige akceptigi ion / tujo: ĉiam-verda arbusto / tulipo: sonoril-folma floro / velki: sekigi pro perdo de akvo.

Junulino malfeliĉa

(Jas ricevita rakonto de juna afrikano)

Perla estas junulino orfa. Ŝi perdis la patrinon, kiam ŝi havis unu jaron. Ŝi estas edukita de sia vic-patrino. La nomo de la vicpatrino estas Venka.

Perla ellitiĝas plej frue, kaj enlitiĝas, kiam ĉiuj aliaj jam estas en la lito.

En tre frua mateno ŝi iras al la fontano por ĉerpi akvon. Poste ŝi balaas la korton de la domo, lavas vazojn kaj vestaĵojn, prizorgas siajn fratojn antaŭ ol ekiri al la lernejo.

Tagmeze, tuj kiam ŝi revenas el la lernejo, ŝi kuiras por la familio kaj reiras al la lernejo.

Vespere ŝi iras al la vendejo por helpi la vicpatrinon, antaŭ ol reveni hejmen por pretigi la noktan manĝon. Tre laca, ŝi strebas lerni siajn lecionojn por sukcesi kaj vivi en ĝojo kaj plezuro.

Perla estas kuraĝa knabino.

Affi Djatougbe Blandine KOSSIVI, Togolando

LINGVA DOKTORO

H

Pri la propraj nomoj I.

La uzado de propraj nomoj estas certe la plej tikla punkto de nia gramatiko. Kio estas gramatike propra nomo? Kiam substantivo (o-vorto) estas nomo ne de ar(eg)o da sam-specaj uloj / aĵoj, sed estas nur tiu de unu-sola individuo, objekto. Ekzemple: kontinento – Afriko, monto – Himalajo, knabo – Ivano, hundo – Vaŭĉjo... kaj multaj aliaj.

Ĉi-foje mi deziras paroli nur pri la personaj nomoj. Antaŭ multaj jarcentoj oni havis nur unu nomon, la propran aŭ bapto-nomon. La plej multaj popoloj nur poste alprenis tiel nomatan familian nomon* (kelkaj popoloj eĉ pliajn nomojn), sed plej firme la propra nomo ligiĝas al ĉiu individuo (kutime oni vokas, alparolas iun per ĝi), ĝuste pro tio Esperanto ĉiam komencas la plenan nomon per ĝi (de tiu venas la konata formo: antaŭnomo).

La plejparto de la propraj nomoj havas sian pli-malpli similan formon en diversaj lingvoj, nia lingvo simple Esperantigis ilin. Vidu, ekzemple antaŭnomojn: *Johano, Aleksandro, Andreo, Petro, Paŭlo, Mario, Julio, Emilio*, ktp. Uzante la lingvon leviĝis du gravaj problemoj:

a) Kelkaj esperantistoj volas uzi sian naci-lingvan formon, ekz. *Pavel, Pál, Pjotr* ktp. dirante, ke tiuj nomoj identigas ilin. Kaj fakte, en la gepatra

lingvo sendube, sed ali-lingvano ofte eĉ prononci ne povas ilin. Mi rekomendas, do, uzi la nacian formon nur, se ĝi ne havas ekvivalenton en Esperanto.

b) Pli grava estas la dua problemo, nome: multaj nomoj (la supraj senescepte) povus indiki kaj virojn kaj virinojn. Kaj tio estas tre ĝena, nepermesbla en lingvo, kiu strebas al absoluta klareco. Miaopinie la iniciato de Kaloĉsay (:Kaloĉai) estas la plej sekvinde. Li proponis, ke la virinaj nomoj finiĝu per -a: *Johano – Johana, Aleksandro – Aleksandra, Julio – Julia...* Tio estas tre proksima al la internacie konata formo kaj apenaŭ ŝajnas artefarita, sed laŭ nia gramatiko per -a finiĝas adjektivoj (bela, bona ktp.). Malgraŭ tio, la praktiko montras, ke tio ne ĝenas, ĉar la adjektiva formo de tiuj nomoj praktike ne estas uzata. La iniciato krei virinajn nomojn per sufikso -in montriĝus tre artefarita (*Andreino, Petrino...*), escepte kelkajn nomojn, kiuj internaciigis en tiu formo: *Georgo – Georgino/a, Jozefo – Jozefino/a* kaj kelkaj ankoraŭ. (Mi ankaŭ ĉe tiuj nomoj rekomendas la aformon por ne fari esceptojn.)

* Bestoj ĉiam ankoraŭ havas, kutime, nur unu nomon.

Daŭrigo en la sekva n-ro

Kontrolu viajn movad-historiajn sciojn !

Testo

Omaĝe al la 100-jara jubileo de UEA

1.	Kiam aperis „La Esperantisto”, la unua Esperanto-revuo ?		
	A) 1889	B) 1893	C) 1895
2.	Kie Esperanto havis plej multajn adeptojn en la unuaj jaroj ?		
	A) Francio	B) Germanio	C) Rusio
3.	Kiu mondfama verkisto apogis Esperanton ekde la unuaj jaroj ?		
	A) Dostojevskij	B) Ĉeĥov	C) L.Tolstoj
4.	Kie okazis la 1a UK de Esperanto en 1905 ?		
	A) Nurenbergo	B) Bulonjo-ĉe-Mar	C) Varsovio
5.	UEA estis fondita antaŭ 100 jaroj. Kiun ni dankas pro ĝi ?		
	A) L.Zamenhof	B) Hector Hodler	C) Couturat
6.	Kiam la unuan fojon UNESKO akceptis favoran rezolucion pri Esperanto ?		
	A) 1954	B) 1966	C) 1985
7.	Kiu periodaĵo estas la centra oficiala organo de UEA ?		
	A) Heroldo de Esp.	B) Kontakto	C) Esperanto
8.	En kiu lando UEA havas plej multajn organizitajn individuajn membrojn ?		
	A) Francio	B) Brazilo	C) Germanio
9.	Kie troviĝas la sidejo de UEA ?		
	A) Svislando	B) Nederlando	C) Svedio
10.	Kiu estas nun la prezidanto de UEA ?		
	A) Probal Dasgupto	B) Renato Corsetti	C) Kep Enderby
11.	Kiu ĉiu-jara eldonaĵo informas pri la strukturo kaj agado de UEA?		
	A) E-informilo	B) Bulteno de UEA	C) Jar-libro de UEA
12.	Pri la organiza laboro de UEA zorgas la Centra Oficejo. Kiu estas ĝia direktoro?		
	A) Roy McCoy	B) Osmo Buller	C) Pasquale Zapelli

Vi povas kontroli la ĝustecon de viaj solvoj sur paĝo 17.

KOLIBRIDO

Aŭtoro: Ernesto Padrón.

Tredukis: José de J. Campos Pacheco.(Kubo)

Zunzún

Ho! Ĉu vi ne aŭdis ion?
Estas kvazaŭ iu
vokus nin.

Helpu min!!!

En la malsupra bildo
vidu, kia mi estas!
La desegnisto forgesis
kolorigi min.

Ĉielo! Rigardu! Maria, la
papilio estas sen koloro,
nur blanka-nigra.



Kion ni povas fari?
Tie ni ne povas
kolorigi ŝin.




Ni petas la infanojn, kiuj legas
ĉi tiun paĝon, kolorigi Marian.

Jes!
Kompreneble!
Vere, niaj amiketoj
helpos ŝin. Ĉu ne?

Koran
dankon!

Infanetoj!
Bonvolu
kolorigi
ankaŭ nin.



nenies 1a



~~privilegioj
diskriminacio~~

ĉies 2a